

Esperanto

revuo



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
95-a jaro • n-ro 1144 (2) • **Februaro 2002**



**Lerni kaj lernigi:
Apogi la centrojn kaj kursejojn**

**Esperanto
ĉe vojkruciĝo**

**Por pli vasta
komunumo**

**Fortalezo
konkeras korojn**

Esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
Telefona kaj telefaks:
+421 43 4222 788
Retpoŝto: revuo@uea.org

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32;
USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu ĉe
via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas eur 3,00.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2
p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16
p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj
sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus
749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro
25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-
konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaks: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: http://www.uea.org

Aganta Ĝenerala Direktoro:
Trevor Steele.

Vi trovos...



pluan bukedon da diverskoloraj floroj, kiujn sukcesis
pluki por vi, malgraŭ la (en meza Eŭropo) malvarma jarsezono, via nova
redaktoro. Iom da varmo en la redakcion jam alportis “la unuaj hirundoj”
(viaj unuaj retaj kaj faksaj reagoj). La februara estas finredaktata, dum la
januara nur komencas atingi viajn leterkestojn. La timema frapanto dankas
pro afabla malfermo de la unuaj pordoj kaj deziras al vi trovi en la bukedo
florojn, kiujn vi eble pleje ŝatas. Se vi tamen ne trovos ilin, bv. helpi al la
redaktoro pluki venonte ankaŭ tiajn. Li dume eklaboras super la marta,
por ke ĝi atingu vin akurate, komence de la monato!

G. H. H.

Enhavo

- 27 MALFERME: Esperanto ĉe vojkruciĝo (Humphrey Tonkin).
28 Lerni kaj lernigi: Ĉu Esperanto estas nura varo?
31 Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).
32 INSTRUADO: Pri la roloj de la verbo esti, kaj cetera...
(Claude Gacond kaj Henri Dognac)
34 Kuraĝigu la dominikajn gekursanojn!
35 POR PLI VASTA KOMUNUMO: Pri varbado kaj kelkaj ideoj
(Renato Corsetti kaj Trevor Steele).
36 La januara Estrar-kunsido (Ivo Osibov).
38 TRA LA MONDO: Bondeziroj el Barcelono. Biblioteko de Interlingvistiko.
Elkore brui. Grupe ĝui.
39 Finiĝis la kurso en Sabadell. Jarfina festo en Vieno. La Kolombia.
Jubileo en Rio-de-Janeiro.
40 Verda Gastejo. Reĝo Lear en Hanojo. Interlingvistikaj Studoj.
41 Unesko-Agado. Komunika Centro en Bruselo. E-Tagoj en la pola Krakovo.
42 Tri generacioj festivale. CDELI pozitive.
43 OFICIALA INFORMILO.
44 Fortalezo konkeris parton de mia koro (Nikola Rašiĉ)
45 LASTE APERIS.
46 DISTRA ANGULO: Lingvaj etudoj aŭ Plena Ilustrita Vort(lud)aro
de Stano Marček. Krucenigma konkurso.

FRONTPAĜE: Partoprenantoj de la pasintjara 32-a Nord-Amerika Somera Kursaro
en San-Francisko, starigita en 1970 de usonaj aktivuloj Bill kaj Cathy Schulze.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, Unesko): d-ro Renato
Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina,
Italio; ☎+39-06-957-57-13; f+39-06-957-66-33;
renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (strategio kaj planado, UN Novjorko):
prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road,
West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-561-26-
69 [h]; f+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48
[of]; f+1-860-768-44-11 [of]; tonkin@mail.hartford.
edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-
Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-
Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-
0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; f+82-53-652-8141
[of]; +82-53-765-0881 [h]; lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun
TEJO, rilatoj kun la komitato, kongresoj, Nobel-
kampanjoj):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-
21000 Split, Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; f+385-(0)21-346-613 [of];
osibov@pravst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten
Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam,
Nederlando; ☎f+31-(0)20-642-18-53; ans.bakker@
esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika
agado:** s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe,
Lomé, Togolando; ☎+228-27-21-17; esp.togo@
cafe.tg.

Informado: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Smirnova
87-16, RU-153034 Ivanovo, Rusio; ☎+7/0932/426-433;
andreo@mail.ru.com.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio
Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-
61-98; f+39-06-39-72-61-69; michela.lipari@
esperanto.org.

Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.

Observanto de ILEI: s-ro Mauro La Torre.

Malferme

Esperanto ĉe vojkruciĝo

La antikvaj grekoj kaj romianoj ofte imagis siajn diojn, kaj la homojn, kun kiuj ili traktas, en situacioj, kie ili devas fari elekton – inter amo, agado kaj saĝo en la kazo de Pariso; aŭ, en la kazo de Herkuleso, inter agado kaj plezuro. Pariso devis prezenti oran pomon al la diino, kiun li favoras; Herkuleso devis fari sian decidon ĉe vojkruciĝo.

La Esperanto-movado, komence de nova jarcento, venas al vojkruciĝo. Ĝi frontas Herkulesan elekton: ĉu sekvi la vojon de plezuro, ĝuante la lingvon ĉar ĝi ekzistas, kaj funkcias, kaj povas bele amuzi; ĉu sekvi la vojon de agado, en kiu ĝi plene engaĝiĝas kun la mondo kaj provas plenumi aŭtentike utilan funkcion.

Ne temas pri tio, ke agente oni ne plu plezuru aŭ plezurante oni ne plu agadu, sed temas pri emfazo: ĉu unuavice Esperanto ekzistas por nia plezuro, aŭ ĉu kiel helpilo por krei pli justan mondon. Ĉu, do, Esperanto estas komunumo aŭ movado, socio aŭ socia potenco?

Sed la afero estas komplika. Socilingvistoj klarigas, ke lingvo ne povas funkcii kiel lingvo se ĝi ne havas komunumon de uzantoj. Same pri Esperanto: ĝi iasence ja estas lingvokomunumo kaj oni ne povas ignori tiun fakton. Nuntempe ni ne donas sufiĉan atenton al la sistema kultivado de tiu nia komunumo. Ne sufiĉas, ekzemple, ke inter ni ekzistu talentaj verkistoj: necesas ankaŭ, ke estu eldonejoj; ne sufiĉas, ke estu eldonejoj, ĉar devas esti ankaŭ libroservoj; kaj ne sufiĉas libroservoj, ĉar ankaŭ devas ekzisti homoj, kiuj efektive aĉetas kaj legas la librojn. Oni devas konscie krei librokulturon, priatentante novajn eldonojn, klerigante la homojn pri la jam ekzistantaj, kaj konstante kaj senĉese disvastigi pere de la Esperanto-gazetaro, kongresoj ktp. informojn pri ĉiuj aspektoj de tiuj libroj kaj ties verkintoj. Similan oni devas fari pri la muzika vivo de Esperantio kaj la teatra vivo. Similan oni devas fari pri radio kaj gazetaro. Pola Radio ne ekzistu kiel omamaĝo de Esperanto, sed kiel funkcia elemento en pulsanta kultura vivo; la revuo *Esperanto* ne ekzistu nur por ekzisti, sed kiel unu gazeto inter multaj, kiuj kaptas kaj kultivas la atenton de la parolantoj de Esperanto. Ni havas Polan Radion, kaj plue havos, nur se ni atentos kaj dorlotos ĝin; ni perdis la revuon *El Popola Ĉinio* ĉar ni nesufiĉe priatentis ĝin.

Tiu kultivado ne okazas per si mem, sed necesas sistema agado. Ni prenu la ekzemplon de niaj kongresoj. Bona kongreso saĝigas la homojn: interŝanĝante siajn spertojn, ili lernas. Bona kongreso estas tiu, kiu klerigas, paroligas, entuziasmigas. Unu kleriga faktoro estas plibonigo de la lingvosocio: ni ne sufiĉe konscie utiligas niajn kongresojn por

plibonigi nian regon de la lingvo. Siatempo oni argumentis, ke oni ne povas havi en Universala Kongresoj lingvokursojn, ĉar tio implicas al la eksterstarantoj, ke ni ne jam regas la lingvon. Male, mi opinias, ke Universala Kongresoj, kaj kongresoj ĝenerale, estas unu el la ĉefaj rimedoj je nia dispono por plibonigi la parolan kapablon de la esperantistaro.

Se temas pri paroligo, niaj kongresoj ankaŭ estu lokoj por serioza dialogo, ne nur pri ekskursaj belajaĵoj aŭ skribado de poŝtkartoj, sed pri la problemoj de milito kaj paco, pri la etiko de internacia kunvivado, eĉ pri etnaj, politikaj kaj religiaj diferencoj. Esperanto ne estu simple ia eskapilo, sed afero, kiu engaĝas la mensojn kaj engaĝas la mondon. Kaj, farante tion, oni ankaŭ entuziasmigas...

Kaj jen ni venas al la esenca demando: *Pro kio nia Esperanto?* Ĉe tiu vojkruciĝo ni ne neglektu la internan vivon de la esperantistoj, sed ni ankaŭ memoru, ke nia unua devo estas plivastigi kaj pliefikigi tiun komunumon tiel ke ĝi etendiĝu al multe pli da homoj. UEA kaj la diversaj landaj kaj fakaj asocioj havas respondecon plifortigi la socion, kiu ligiĝas pere de Esperanto (tute sendepende, cetera, de tio, ĉu ĝi membras en tiuj organizaĵoj), sed tiu respondeco estas nur fundamenta elemento en multe pli larĝa agadkampo, en kiu Esperanto aperu kiel alternativo al la nuna monda lingva reĝimo.

Tiun agadkamon bone difinas la *Strategia Laborplano de UEA*, kiu estas organizita ĉirkaŭ tri bazaj aktivecoj: *Informado, Instruado, Utiligado*. Tiuj tri kolonoj formu bazon de nia komuna agado. Se UEA mem plene plenumos ilin, ĝi devos iom profunde repripensi kiel ĝi disdividas siajn fortojn, ekzemple kiel ĝi disdividas la taskojn de la Centra Oficejo kaj la estraranoj, kaj kiel ĝi elspelas siajn rimedojn. Nuntempe ĝi ne donas sufiĉan atenton al *Informado*, nek al *Instruado*.

En pasinteco, tiuj taskoj kuŝis ĉefe ĉe la landaj asocioj, sed la landaj asocioj lastatempe malfortigis, interalie ĉar la malnova ŝablono de asocioj konsistantaj el aliĝintaj membroj ne plu funkcias, ĉu ene de la Esperanto-komunumo ĉu ekster ĝi. Krome, la komunika revolucio tiel ŝanĝis la pejzaĝon, ke strikta disdivido inter tio, kio okazas enlande, kaj tio, kio okazas ekstere, ne plu havas sencon. UEA devas multe pli sisteme klopodi respondi al la bezonoj de enlandaj movadoj, kaj helpi ilin tie, kie helpo estas bezonata; ĝi devas pli ofte



Humphrey Tonkin



En la nuntempa mondo multaj homoj emas rigardi ĉion kiel varon. Ne nur manĝaĵojn, vestaĵojn, loĝejoj, ludilojn, librojn oni konsideras simplaj “varoj”, sed oni klopodas redukti al nuraj varoj ankaŭ la korpan sanon, la psikan kontenton, la diversajn klerecojn. Ĉion oni volas industriece produkti, enmerkati, por vendi kaj profiti. Kompreneble ĉi tiu pensmaniero havas siajn kialojn, siajn utilojn kaj sian nomon: *ekonomio*.



Maŭro la Torre

Lerni kaj lernigi: **Ĉu Esperanto estas nura varo?**

Ali-rigarde, sen diablighi la ekonomian vidpunkton, kiu bone klarigas unu flankon de la monda funkciado, ni devas tamen ne forgesi ke ekzistas ankaŭ aliaj vidmanieroj, aliaj *filozofioj*, kiuj helpas kompreni la homajn elektojn kaj preferojn.

Kreskaĵo, kiel tritiko, aŭ bestaĵo, kiel lakto, ja estas ankaŭ varoj, kiujn oni produktas por vendi al homoj kiuj bezonas tion por sin nutri, sed ili estas ankaŭ elementoj de biologia mondo, aranĝita laŭ kompleksaj ekosistemoj, kies ekvilibrojn oni devas science kompreni kaj iel *respekti*.

Libro aŭ filmo povas ja roli kiel varoj, vendataj kaj aĉetataj, sed ĉu iu kredas ke ili estas nuraj varoj? Aŭ ĉu ilia kultura enhavo ne havas alispecan valoron, kiu ne estas simple kaj nure ekonomia?

Pentraĵo, skulptaĵo aŭ arkitekturaĵo, sendepende de ties posedo aŭ proprieto, povas klerigi kaj eduki milionojn da homoj laŭ (“bonaj” aŭ “malbonaj”) modeloj, kies valoro ne estas (nur) ekonomie taksebla.

Ni, legantoj de ĉi tiu revuo, estas ĉiuj esperantistoj, anoj de la Esperanto-movado. En la lastaj jaroj la merkatisitoj instruas al ni ke nia lingvo Esperanto estas varo, kiel aliaj kulturaj aŭ materiaj varoj. Antaŭe ni naive parolis pri la

interna ideo de Esperanto, pri propagando de la Internacia Lingvo inter la ceteraj homoj, pri la fina venko kiam la mondo estos akceptinta nian proponon.

Nun, per pli ekonomiisma vortuzo, ni planas la enmerkatingon de nia lingva varo, pripensas reklamkampanjojn por difinitaj celgrupoj, kaj niaj kongres-organizantoj (aŭ eldonistoj) konsideras la kongresanojn (respektive la legantojn), kiel konsumantojn de la *aĉetaĵo Esperanto*. Sed ĉu vere lingva komunumo estas nenio alia ol speco de intelekta merkato?

Se ni volus vendi televidilojn aŭ poŝtelefonojn en virga lando, kie tiaj objektoj estas ankoraŭ malmulte uzataj kaj eĉ tute ne konataj, ni devus: – unuavice informi la koncernan socion pri la ecoj, la avantaĝoj, la ekonomia valoro de tiuj iloj, kaj allogi la homojn al aĉeto; – duavice en tiu lando ni devus konstrui la kondiĉojn por la reala uzebleco kaj konvena aplikado de tiuj iloj (televidaj program-produktantoj, dissendiloj, retoj da antenoj aŭ kabloj, plinombro de la uzantaro, ...).

Poŝtelefonoj aŭ televidiloj oni unue elektas, aĉetas (se oni havas la monon), kaj tuj poste (samtage) jam ekuzas laŭbezono. Tia tuja rilato inter la aĉeto kaj la uzo de la varo ne validas en la kazo de la homo, kiu iam elektas lingvon kaj volas uzi ĝin. Kiom da homoj ni konas, kiuj iam decidis favore al la uzo de Esperanto, sed neniam atingis la reale fluan uzeblon (kompren- kaj parol-kapablon)?

Guste tial, inter la INFORMA fazo kaj la APLIKA fazo oni bezonas trian longan fazon: LERNADO. Tiuj tri fazoj precize

speguliĝas en la triopa dispartigo de nia nuna Strategia Plano: INFORMADO, INSTRUADO, APLIKADO.

Tie la unua ĉapitro (informado) kaj la lasta (utiligado, aplikado) prave sekvas la ekonomian logikon: informi (propagandi, reklami, ...) por aĉetigi kaj utiliĝi (t.e. krei favorajn kondiĉojn por la lingva uzo en ĉiuj kampoj kaj situacioj de la vivo).

Tamen inter INFORMADO kaj APLIKADO staras meza fazo esenca por lingvo: INSTRUADO.

Se homgrupo aŭ organizita movado kampanjas por konvinki la ceterajn civitanojn pri politikaj ideoj (kiaj, ekzemple, la neceso de mediprotektado aŭ la kontraŭeco al la mortpuno), plej ofte per nura konvinkado de la homoj oni jam atingas la idean celon. Tio ne sufiĉas por la esperantistoj. Ni ne

kontentiĝas per la konvinkado de la uloj pri la laŭgeco de la Esperanta idealo; ni ja pretendas ke la konvinkitoj lernu la lingvon. Kaj tiu lernado (de la eklerno ĝis la ellerno) estas tre longa pena procezo, kiu neniam vere finiĝas!

LERNI → INSTRUI → INSTRUANTO → INSTRUISTO

En la esperantistaro de ĉiu individuo la lernado estas tiom grava kaj esenca fazo (kiu postulas tiom konsiderindan tempon kaj laboron), ke tio jam parte klarigas al ni, kial en nia movado relative abundas instruantoj kaj instruemuloj. Se (en la menciita Strategia Plano) ni interkrucigas la ĉapitron INSTRUADO kun la agaddirekto PROFESIIGO evidentigas la bezono disponi ne nur je instruemuloj sed je instruistoj.



Tamen ni konsideru ke E-instruistojn ni povas ekhavi dumaniere:


1) lernigi Esperanton al profesiaj lerneja instruistoj (tiel enirigante Esperanton en la publikajn lernejojn);

2) trejnante niajn nunajn Esperanto-instruantojn al profesiaj lingvoinstruistaj kapabloj, tiel ke ili povu roli kiel dignaj helpantoj de la lerneja istoj. Ambaŭ vojojn indas trairi!

Se ni, miloj da iamaj Esperanto-instruantoj, volas ekpensi nian lernigan agadon pli profesie, unue ni devas pli objekte plani nian intervenon:

- *kial niaj lernantoj lernas (aŭ lernu) la Internacian Lingvon?*
- *kial, en kiaj kondiĉoj ili lernu ĝin?*
- *kie, en kiu institucio aŭ instruisistemo ili lernadu?*
- *por kio, por kia aplikado ili lernu ĝin?*

Temas pri la bazaj demandoj, kiujn ni klopodu almenaŭ proksimume kaj prognoze respondi, antaŭ ol ekinstrui en kurso. Ni ne rajtas aŭtomate subkompreni, ke la kialoj de nia iama lernado egalas tiujn de niaj nunaj kursanoj, kaj tial simple ripeti la tiamajn celojn/modelojn/manierojn.



KIAL LERNI ESPERANTON?

Pri la kialoj, pro kiuj la homoj eklernas Esperanton, ekzistas legindaj studoj, kiuj minimume montras ke la kialoj povas esti tre variaj (de lingva ŝato, tra spiro al pli bona mondkomunika ordo, ĝis klubemo aŭ mikrosocia grimpemo). Ĉu ni vere konas la lernokialojn de niaj kursanoj? Se ne, ĉu ne utilus pli bone ekkoni ilin, por adapti ankaŭ al tio la lernigotan lingvomaterialon? Sed ne nur gravas esplori pri la kialoj kaj celoj de niaj jamaj kursanoj, ni povas ankaŭ renversi la problemon. Pli realisme analizi la historiajn ekzisto-kialojn de Esperanto kaj bazi sur tiuj motivoj nian propagandon, por atingi aliajn pli kongruajn interesatojn.

Pri tio mi faru du konkretajn ekzemplojn. Multaj niaj "samideanoj" estas jam ĝeneralaj lingvoŝatantoj aŭ almenaŭ lingvaj scivolemuloj. Sed la lingvemuloj en la mondo estas miloble pli multaj ol ni, kaj 99% el ili ne vere scias kaj kia estas nia lingvo. Se vere ekzistas ioma pozitiva interrilato inter la ĝenerala prilingva intereso kaj la alpreno de la (facila, neŭtrala, ktp.) lingvo Esperanto, kial ni ne unue celas tiujn mediojn aŭ eĉ kreas allogajn okazojn por lingvemuloj? Responde je tiuj ideoj, dum la lastaj jaroj ekkreskis inter la esperantistoj nova tradicio: aranĝado de LINGVAJ FESTIVALOJ.

Tiuj estas kelktagaj publikaj eventoj, kie dekoj da spertuloj (ne nepre profesiaj fakuloj) vikle kaj scivolve prezentas lingvojn (eĉ malmulte konatajn!) per diversaj aŭdvidaj rimedoj al amasoj (kelkcentoj) da studentoj, lernejoj, kaj scivolemuloj. Kiel tio rilatas kun Esperanto? Ŝajne neniel; sed fakte nur la esperantistoj kapablas tiom interese kaj neŭtrale aranĝi tiajn panoramajn lingvajn gustumadojn, kie ilia lingvo ludas apartan pontan, peran rolon. Krome inter la miloj da vizitantoj al tiuj festivaloj – kvazaŭ kribrite – aperas eventualaj interesotoj pri Esperanto, pli multaj ol en ajna kultura kunveno aŭ konferenco.

Alia ekzemplo estas la projekto de ILEI/UEA, nomata INTERKULTURO. Per ĝi esperantistoj "atakas" instruistojn, edukistojn, kiuj jam iom sentemas pri la ĝenerala problemoj de interkultura edukado en nia bunta kaj ofte konflikta nuna mondo (oriento/okcidento, nordo/sudo, religioj/lingvoj/kulturoj, migrado, interreta kunlaborado, ktp.), eble vidante

nur partojn de la problemaro kaj alfrontante ĝin per nekonvenaj rimedoj. La propono de nia *Interkulturo* prezentiĝas kiel konkreta eduka medio por reala kunlaborado de klasoj el foraj landoj kaj kulturoj, uzante pli justan lingvan solvon. Krome, por la lernejoj teknologie provizitaj, la interreta medio, nomata *Kvazaŭa Lernejo Tibor Sekelj* liveras apartan oportunon por senpera komunikado kaj lingva aplikado (kaj defio por la organizantoj).

KIEL LERNI? KAJ KIEL INSTRUI?

Ankaŭ la *kialoj* (manieroj) de Esperanto-lernado estas tre variaj. Ni distingu almenaŭ tri kazojn.

1) Kvankam mi ne konas statistikaĵojn pri tio, mi havas impreson ke rimarkinda parto de la nunaj E-parolantoj memlernis la lingvon per lernolibroj, pli-malpli izolite, sen helpo de instruanto. Kelkaj el ili uzis aŭtodidaktan materialon, speciale verkitan por memlernantoj, sed plej multaj simple utiligis la tradician gramatiklibron.

2) Kompreneble, duavice ni povas konsideri la lernantojn en vidalvida (lernocambra) kurso, kie la instruanto aplikas ian instrumentodon, laŭ sia gusto, kapablo, kaj cirkonstancoj. Pri tio ni havas diversajn tradiciojn, inter la rekta metodo de Andreo Cseh (Ĉemetodo) kaj la latin-modelaj gramatik-ekzercaroj kaj tradukaj instrumentadoj; inter tiuj du ekstremoj troviĝas multaj variantoj de situaciaj, legocelaj, komunikcelaj, aŭdvidaj, "programitaj" kursoj.

3) Samtempe kun la izolita memlernado kaj la diversmetodaj vidalvide ĉeestaj kursoj, jam de multaj jardekoj funkciadas (paper)korespondaj, radiaj kaj eĉ televidaj kursoj. Temas pri tri manieroj de senĉeesta lernado, t.e. de lernsituaĵoj kiam la lernanto kaj instruanto ne renkontiĝas samloke kaj samtempe, sed la lernomaterialo estas pretigita aliloke kaj alitempe ol kie/kiam la lernanto per ili lernas. Sed lastatempe la komputilaj kaj la interretaj teknologioj tiom rapide progresas, ke ekeblas konstrui kaj disponigi tutan gamon da diversaj novaj lernmanieroj:

- ekzistas novtipaj korespondaj kursoj, kiuj funkcias per retpoŝto;
- troveblas komputilaj kursoj, facile elŝuteblaj el Interreto, por komputilhelpata interaga memlernado;

globale, tutmonde. Mi ne parolas ĉi tie pri fondo de iu nova organizaĵo sed pri la iompostioma transformo de UEA el tradicia pormembrara asocio al organizaĵo pli kapabla plenumi siajn tutmondajn bezonojn en la ŝanĝita mondo de la dudekuna jarcento.

Eble la vojomontrilo ĉe la vojkruciĝo kie ni nun staras indikas al iu tia "Esperanto Internacia" unudirekte kaj al iu konata ŝablono alidirekte. La konata ŝablono plezurigas kaj amuzas, sed por engaĝi la pli vastan mondon la *Vojo de Plezuro* ne sufiĉas: necesas la *Vojo de Agado*. Ek al dinamika kaj aganta, tutmonda Esperanto Internacia!

(laŭ parolado dum la Itala Esperanto-Kongreso, Triesto)
Humphrey Tonkin

– pli ĝenerale en la TutTera Teksaĵo (TTT), la granda interkomputila hiperteksto, kiu aranejaĵe envolas la nunan mondon, oni povas elpensi novajn kursmodelojn, kiuj ĉiam pli kontentigos apartajn postulojn je aŭdvidaj ekzercaroj, je komunikado kun la monitoroj (instruhelpantoj) kaj kun foraj kunlernantoj, kaj je aŭtomata ekzamenado de la akiritaj lingvaj kapabloj;

– krome sur lumdiskoj (CD-ROM, DVD, ...) oni povas liveri aŭdvide interagajn kursmaterialojn, eĉ kun filmeroj elekteleblaj laŭ oportunaj lernovojoj.

Tamen ni ne tro iluziiĝu ke la teknologiaj progresoj – per si mem – kontentigos niajn didaktikajn bezonojn. Male, se niaj lernaj kaj instruaj modeloj restas malfortaj kaj nekklaraj, povos okazi ke la potencaj teknologioj ne nur ne solvos, sed eĉ emfazos, nian instruikan malfortikecon.

KIE LERNI?

Ni komencu per konsidero de la malplej ofta situacio, tamen divastiganta. En ĉiuj kontinentoj dise vivas jam centoj da familioj, kie la infanoj lernas kaj ĉiutage parolas la Internacian Lingvon. Iam dum la jaro kelkaj el ili havas la bonŝancon renkontiĝi en REF (Renkontiĝo de Esperantaj Familioj), IJK (Internacia Infana Kongreseto), PSI (Printempa Semajno Internacia), kaj en similaj okazoj, kunlaborante kaj amikiĝante kun alilandaj samaĝuloj. Post kelkaj jaroj plej granda parto el ili retroviĝos en IJK-oj (Internaciaj Junularaj Kongresoj) de TEJO.

Sed evidente, la plej kutima lernosituaĵo estas ankoraŭ la kursoj en la Esperanto-klubejoj, en kulturejoj, sed eĉ en la internaciaj kursejoj. Kelkaj el tiuj kursejoj kaj prelegejoj (la Karlskoga Popola Altlernejo, la Greziljona Kastelo, Kvinpetalo, KCE en Ĉaŭdefono, Svislando), ..., ĝis la somera E-kursaro en la San-Franciska Ŝtata Universitato (Usono) kaj la Esperantodomo en Jacugatake (Japanujo) estas pli-malpli evoluantaj institucioj, kiuj meritis vizitadon, diskonigon kaj ĉian subtenon. Tiurilate menciindas ĵusa interkonsento inter ILEI kaj UEA por kunordigi, apogi kaj plivalorigi la laboron de tiaj centroj.

Malpli ofte, sed memorinde, Esperanto-instruado okazas ankaŭ en la publikaj instrusistemoj. En kelkaj landoj, kia Hungarujo, Esperanto estas instruata samrange kun la aliaj fremdlingvoj.

En aliaj lokoj ekzistas esceptaj (t.n. eksperimentaj) instruadoj, kie en iuj bazaj kaj mezaj lernejoj – rusaj, polaj, italaj, jugoslavaj, rumanaj – kompletaj klasoj lernas la lingvon

kadre de apartaj projektoj (kiel ekzemple Interkulturo). Krome, en pli multaj aliaj okazoj Esperanto estas lernobjekto de libervolaj grupoj ekster la deviga lernotempo: pri tio videblas ekzemploj francaj, belgaj, ĉeĥaj, italaj, kroataj, svedaj, ktp., ankaŭ kadre de projektoj, kiaj *Eŭroskola*.

Fine, la Internacia Lingvo estas diversnivele instruata ankaŭ en iom varia nombro da universitatoj: la plej konata estas la Esperanto-Fako en ELTE-Universitato (Budapeŝto), sed nun la plej grava estas la Universitato Adam Mickiewicz <http://www.amu.edu.pl/> en Poznań (Pollando), kie disponeblas tuta perfektiga kursaro pri esperantologio, senĉeeste partopren-ebla. Krome aldoniĝas pluraj universitataj fakultatoj, ĉe kiuj okazas almenaŭ elementa kurso (en la japana urbo Kobe, en la korea Kangnam, en la itala Torino, ktp.). Pri tiaj kursoj nun malsufiĉas informoj, aktualaj kaj geografie kompletaj, sed ĝuste tial nun estas aranĝata en tiu kampo vasta enketo fare de nova ILEI-sektoro.

POR KIO LERNI?

Alivorte: *aplikado kaj utiligado* de Esperanto. Tio estos ĉefartikola temo por unu el la venontaj numeroj de la revuo *Esperanto*. Ĉi tie, parolante pri universitatnivelaĵoj institucioj, ni nur menci pri AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), kie oni povas apliki la Internacian Lingvon je faka studado, ekzemple, pri astronomio, kibernetika pedagogio, aŭ psikolingviko, akironte per ekzamenoj studajn kredit-unuojn, ekstere agnoskeblajn.

Nun mi haltigu nian superrigardan virtualan vojaron tra la *kialoj*, *kialoj*, kaj *kioj* de Esperanto-lernado kaj pri la kvalitoj de *antoj* kaj *istoj* de Esperanto-instruado.

Dum la venontaj monatoj ni povos gastigi diversspecajn spertulojn kaj fakulojn pri atentindaj aspektoj de la lernaj kaj instruaj problemoj: komparado de instruprogramoj, objektiva taksado de komputilaj kaj retaj E-kursoj, trejnadado de E-instruistoj, interkultura aŭ transkultura edukado, *Esperanta kulturo* en niaj kursoj, interlernejaj projektoj, denaska Esperanto-akirado.

Se vi ne jam fordeĝis per la ĉi-supraj konsideroj, bonvolu reagi al ni – laŭ via vidpunkto – per viaj argumentoj kaj demandoj!

EVENTOJ La plej ofta E-gazeto!
pk. 97, HU-1675 Budapest, Hungario

● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ●

Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- trisemajna intensa lernado de Esperanto
- por komencantoj ĝis akademianoj
- internaciaj instruistaro kaj studentaro
- riĉa vespera kaj semajnfina programo

Post 32 jaroj en San-Francisko, NASK ekmigras!

En 2002, la kursaron gastigos mond fama interkultura altlernejo, *The School for International Training*, en nordorienta Usono. Kune kun la profesuloj de la lernejo, niaj instruistoj evoluigas novan kaj entuziasman studprogramon kiu emfazas la uzadon de Esperanto por interkultura komunikado kaj kunlaboro.



Datoj: 8-26 julio, 2002. Loko: Brattleboro, Vermonto (facile atingebla de Bostono, Novjorko, aŭ Hartfordo). Instruistoj: d-rino I. Koutny (Hungario/Pollando), d-ro A. Melnikov (Rusio), d-ro R. Resende (Brazilo). Kotizo: loĝado en dula ĉambro kun manĝoj US\$640; kurs-kotizo US\$900. Stipendioj haveblas.

Por pliaj informoj: www.esperanto.org/nask/ kaj www.sit.edu, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512; tel. (360) 754-4563; fakso (360) 786-9175; retpoŝto eddyellen@aol.com

interkonsiliĝi kun la enlandaj aktivuloj; ĝi devas helpi klerigi kaj efikiĝi ilin.

Tiu respondecas ankaŭ rilatas al edukado. La lastatempe starigo de la retpaĝaro *edukado.net* estas bona ekzemplo de internacia kunlaboro por faciligi la agadon de instruistoj kaj instruantoj surloke. Ĝi same rilatas al la evoluiĝo de la lingvo mem: mi daŭre esperas pri pli aktiva kunlaboro inter la Akademio (kaj ties faka sperto) kaj UEA (kaj ties kapablo disvastigi kaj diskutigi).

Fakte, mi opinias, ke por nova jarcento necesas nova koncepto de la rilato centro-periferio en la Esperantomovado. Ni bezonas ian *Esperanto Internacia* similan al *Amnestio Internacia*, kiu havas siajn enlandajn agantojn sed esence ne rekonas la obstaklojn de landlimoj sed agas



Prididaktika bablado inter
Claude Gacond kaj Henri Dognac

Pri la roloj de la verbo *esti*, kaj cetere...

Unua rolo de la verbo *esti*

● **Henri:** Observante vin instrui Esperanton al komencantoj, mi konstatis, ke vi dediĉas multajn paroligajn ekzercojn al la asimilado de frazoj kun la verbo *esti*. Ĉu vi konsideras, ke tiu verbo indas je tiom da atento?

● **Claude:** Certe jes! Analizo de pli ol 4000 test-folioj de partoprenintoj al mia perkoresponda kurso por franclingvanoj malkovrigis al mi, ke en Esperanto la verbo *esti* ludas kvar malsimilajn rolojn, kiujn la lernolibroj ĝenerale tre supraĵe aŭ nebulece klarigas, kiel cetere faris siatempe mia kurso.

Tiu analizo ankaŭ montris, ke ofte la instruantoj mem ne konscias pri la semantika komplekseco de la Esperanta verbo *esti*, kaj ke pro tio ilia didaktiko tiurilate ne tre koheras. Nur el bona lingvo-analizo kreiĝas taŭga kaj fruktodona lingvo-instruado.

● **Henri:** Interese! Ĉu vi akceptus indiki al mi, kiujn kvar rolojn plenumas la Esperanta verbo *esti*?

● **Claude:** Volonte! Kiam mi ekparoligas komencantojn helpe de bildaro, mi unue tre atentigas ilin pri la verbo *esti* en ties nepre karakteriza rolo simbologiebla per la signo (=).

[en ekzemploj:

Tulipo estas (=) floro. Rozo estas (=) floro.
Tiuulo kaj rozo estas (=) floroj.
Hundo estas (=) besto. Kato estas (=) besto.
Hundo kaj kato estas (=) bestoj.
Tablo estas (=) meblo. Seĝo estas (=) meblo.
Tablo kaj seĝo estas (=) mebloj.
Libro estas (=) objekto. Telero estas (=) objekto.
Libro kaj telero estas (=) objektoj. Ktp...



En tiuj pens-unuoj la vortordo ne estas libera. Kaj koncerne al la paroliga instruado jen ekzemploj de tipaj demandoj kun ties atendataj respondoj:

Ĉu tulipo estas floro? – Jes, tulipo estas floro.
Ĉu kato estas meblo? – Ne, kato ne estas meblo, kato estas besto.
Kio estas rozo? – Rozo estas floro.
Kio estas tavolo kaj seĝo? – Tavolo kaj seĝo estas mebloj. Ktp...

● **Henri:** Ĉiuj instruantoj faras tiajn paroligajn demandojn.

● **Claude:** Tute certe jes, sed kiel vi baldaŭ komprenas, ili bedaŭrinde miksas en ili aliajn rolojn de la verbo *esti*. Kaj tial fontas ĉe la lernantoj postaj eraroj aŭ miskomprenoj, kiuj estus eviteblaj, se oni unue estus uzinta la verbon *esti* nur kun la signifo simbologiebla per (=).

Kaj efektive tamen tiuj ĉi perbildajn paroligajn ekzercojn, oni povas samtempe riĉigi la vortprovizon de la instruatoj per regula aldono de novaj bildoj bone elektitaj laŭ vidpunkto fonologia, cele al efika kontrolo de la pronenco de ĉiuj sonoj konkretigitaj de la 28 literoj de la Esperanta alfabeto.

Oni ne forgesu aldoni ekzercadon de la sonoj "sc" kaj "dz" skribataj per kombino de po du literoj. Tiujn du sonojn tre tipe Esperantajn bedaŭrinde neglektas multaj lernolibroj. Tial inter mia besta bildaro nepre troviĝas saltema sciuro kaj inter la

bildoj de homoj renkontiĝas diversaj familianoj: avo kaj avino, patro kaj patrino, knabo kaj knabino, onklo kaj onklino, ktp..., per kiuj oni povas komprenigi kaj utiligi la vortojn *edzo* kaj *edzino*.

● **Henri:** Do vi riĉigas la vortprovizon sen samtempe kompleksigi la frazstrukturojn.

Dua rolo de la verbo *esti*

● **Claude:** Tute ĝuste! Kaj tiel ĉiu lernanto povas koncentriĝi je la asimilo de la nomoj, kiujn konkretigas la manipulata bildaro daŭre riĉigata de novaj ilustraĵoj.

Sed fakte hodiaŭ ni ne diskutas pri la efiko de la perbildita instruado, sed pri la diversaj roloj de la verbo *esti* kaj pri la neceso ilin taŭge komprenigi kaj asimiligi.

La instruado de la dua rolo de la verbo *esti* kondukas al unua struktur-sanga ekzerco, kiun la tradiciaj lernolibroj ĝenerale absolute neglektas.

[en ekzemploj:

Elefanto estas granda, muso estas malgranda.
Elefanto grandas, muso malgrandas.
La haroj de la knabo estas ruĝaj.
La haroj de la knabo ruĝas.
La haroj kaj la barbo de la avo estas blankaj.
La haroj kaj la barbo de la avo blankas.



● **Henri:** Do vi tuj enkondukas la senperan verbon de la adjektivoj.

● **Claude:** Jes, ĉar tio estas unu el la tipaj karakterizaĵoj de la Esperanta gramatiko ekde la unua periodo de la zamenhofa lingvo, kvankam nur meze de la 20-a jarcento gramatikistoj komencis disputi pri ĝi.

Tiurilate mi ŝatas rakonti komikaĵon, kiu okazis dum semajna kurso ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Venis al ni vizite el Francujo Esperanto-instruanto, ĝuste kiam miaj kursanoj kafumis kaj biskvitis sur la teraso post tia struktur-sanga ekzerco; ili provis daŭrigi la ludon imagante mem frazojn, kiujn ili tuj korusse transformis. Montrante la bluegan ĉielon unu el ili ekkriis: *La ĉielo estas blua*, kaj ĉiuj korusse ripetis *Jes, la ĉielo bluas*. Alia konstatis: *La kafo estas bruna* kaj ĉiuj korusis: *Jes, la kafo brunas*. Tria deklamis: *La akvo estas varma* kaj ĉiuj ripetis: *La akvo varmas*. Ktp... Por iuj la akvo varmetis, por aliaj ĝi varmegis, kaj regis aĝrablega etoso ĝojplena.

Sed la franca kolego ne partoprenis tiun ĝeneralan feliĉon. Li tuj vigle kritikis min asertante, ke oni ne rajtas instrui la senperan verbon de adjektivaj radikoj, kiu estas gramatika fenomeno rezervita al la poezia lingvo. Lian sufiĉe pedantan kaj ne tre afablan kritikon klonkludis la aserto: *Vi malpravas! Oni ne rajtas senpere verbigi adjektivojn*. Mi ĝentile transdonis al li la libregon *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, kiu dum mia instruado ĉiam kuŝas sur la tavolo ekde la unua leciono. Ĝi estas referencilo. Serĉu la vort-elementon *prav*, mi petis. Kaj li baldaŭ konstatis,

ke laŭ la propra teorio li estus devinta diri: *Vi estas malprava!*, sed ke Zamenhof mem jam senpere verbigis tiun ĉi adjektivon en sia proverbo *Kiu jam havas, tiu pravas*.

● **Henri:** En tiuj ĵus menciitaj frazoj, per kio la verbo *esti* malsimilas al la verbo *esti* de la antaŭaj ekzercoj?

● **Claude:** Ili simple ne estas simbologieblaj per la signo (=). Fakte en tiuj ĉi pens-unuoj la verbo *esti* ludas helpan rolon por doni verban signifon al la koncernaj adjektivoj, kiel tio okazas en la franca lingvo, kiam oni diras: *Le ciel est bleu*. kaj *Le café est brun*. Sed diference al la franca lingvo, Esperanto, pro sia internacieco, havas la kapablon senpere verbigi tiujn ĉi adjektivojn, kion ne kapablas fari la franca lingvo kaj kun ĝi multaj aliaj hind-eŭropaj lingvoj.

Tiu unua struktur-sanga ekzerco ebligas klarigi, ke ne estas per siaj vort-elementoj *est*, *blu*, kaj *kaj brun*, ke Esperanto estas internacia, sed per sia kapablo esprimiĝi kiel la lingvoj bezonantaj help-verbon por verbigi adjektivojn, aŭ simple kiel la lingvoj, kiuj kapablas senpere verbigi adjektivojn. La interlingvistoj, kiuj propagandis favore al la naturalismaj sistemoj *Occidental* aŭ *Interlingua* tion ne komprenis. Ili kredis, ke internacieco troveblas je la leksika nivelo. Tial ili kreis kaj provis ekvivigi interlatinidajn idiomojn, kiuj bedaŭrinde gramatike neniel estas internaciaj. Kontraŭe al Esperanto, per siaj gramatikaj kaj vortfaradaj handikapoj tiuj lingvo-projektoj tipe apartenas al la latineca mondo. Ili neniel konkurencas la internaciecon de Esperanto.

● **Henri:** Kial niaj lernolibroj ne instruas tiun ĉi karakterizan gramatikan fenomenon?

● **Claude:** Simple ĉar niaj instruiloj kontentigas ripetadi, kelkfoje per aliaj vortoj, kio estis siatempe jam indikita en la unuaj lernolibroj, tio estas en la zamenhofa 16-regula *Unua Libro* de 1887 kaj en la epokfara *Commentaire sur la Grammaire Esperanto* [Komentario pri la Gramatiko Esperanto] de Louis de Beaufront. Sekve al la apero en 1900 de tiu didaktike epokfara verko, oni ne malprave konsideris ĝian aŭtoron kiel la Duan Patron de Esperanto.

En 1905 la proklamo de la *Fundamento de Esperanto* kiel oficiala lingva bazo kaj en 1908 la idistiĝo de la Dua Patro de Esperanto definitive stabiligis la Esperanto-didaktikon. Ekde tiam la kurs-verkantoj ne nur fidele obeas al la *Fundamento*. Ili samtempe rajtigas sin ĉerpi rekte aŭ nerekte el la verko de la eks-dua patroĉeno sen menciil siajn fontojn. Ĉiu pli-malpli kopiadas siajn antaŭulojn.

Kio ne estis klarigita en la menciitaj fundamentaj libroj, tio ĝenerale daŭre ne estas instruata ĝis nun en niaj lernolibroj.

Ekzemple ege malmultas la instruiloj, kiuj klarigas la formadon de la landnomoj. Tial abundas diskutacoj prilandnomoj en la rondoj de komencantoj.

Kaj nenio estas dirita pri la senpera verbigo de adjektivoj, adverboj, substantivoj, prepozicioj kaj konjunkcioj, kiu estas karakterizaĵo de la Esperanta gramatiko.

Kaj la listo de la instruataj prefiksoj kaj sufiksoj restis senŝanga, kvankam la lingvo riĉiĝis je novaj vikle vivantaj afiksoj. Stranga didaktika fenomeno, ĉu ne?

● **Henri:** Vi do opinias, ke la lernolibroj ne instruas la nuntempan lingvon.

● **Claude:** Mi simple konstatas, ke ili ne rezultas el analizo de la reale funkcia lingvo, sed ĉefe el remaĉado de malnovaj instru-normoj. Ekzemple ege malmultas la lernolibroj, kiuj almenaŭ resume raportas pri la vortfarada teorio de René de Saussure, kiu en 1910 fine komprenis eĉ al Zamenhof mem, kiel Esperanto memstare kreas sian vortaron, tio ĉi responde al la vortfarada teorio de Louis Couturat, kiu naskis la ido-skismon.

● **Henri:** Kiel vi klarigas tiun ĉi stagnemon de niaj instruiloj?

● **Claude:** Ĉar Esperanto ne estas instruata en la publikaj lernejoj. Sed ni fakte troviĝas antaŭ senlira problemo. Estas ankaŭ, ĉar Esperantujo ne kapablis publikigi konvenajn

lernolibrojn, kiuj reale priskribas la lingvo-uzon kaj ankaŭ instruas pri la disvolviĝo de la Esperanta literaturo, ke Esperanto ne povas eniri la publikajn lernejojn.

Sed ni revenu al nia verbo *esti*, la kaŭzo de nia konversacio.

● **Henri:** Do, tiu verbo *esti* ludas la rolon de helpilo por verbigi adjektivojn, kiel ĉe la lingvoj, kiuj ne povas memstare verbigi la adjektivojn.

● **Claude:** Jes, kaj tial ambaŭ verbigaj formoj devas esti ekzercataj, la verbigo helpe de *esti* kaj la senpera verbigo, kiu tendencas ĝeneraliĝi kaj tial renkontiĝas pli kaj pli ofte eĉ en konversacioj.

Tial la kristanoj ŝatas kanti: *Laŭdatu Dio!* anstataŭ *Dio estu laŭdata!* kaj aŭdigas frazojn kiel: *Se mia patro aĉetintus tiun ĉi domon, ni nun ne devus translokiĝi!* anstataŭ la pli tradicia kaj ĝenerale la sola instruata eldoro *Se mia patro estus aĉetinta tiun ĉi domon, ni nun ne devus translokiĝi!*

● **Henri:** En la TEJO-medio tiaj formoj oftas.

● **Claude:** Vi ĵus uzis senperan verbigon de la adverbo ofte, kiu do ne kontentigis naski la adjektivojn ofte, sed eĉ la verbon oft. Konstante oni aŭdas tiajn senperajn verbigojn ne nur de adjektivoj, sed ankaŭ de substantivoj, adverboj, prepozicioj, ktp. Tial indas tuj instrui ilin al la komencantoj. Ne estas normale, ke freŝbakitaj esperantistoj malkovru tiujn ĉi uzojn ekster la kursaj rondoj okaze de rekta kontakto kun lingvo-praktikantoj.

Do ankaŭ frazoj kiel: *En tiu familio la barbulo estas la avo kaj la senharulo estas la patro* dirigu sen la helpo de la verbo *esti* per struktur-sanga ekzercado: *En tiu familio la barbulo avas kaj la senharulo patras aŭ En tiu familio avas la barbulo kaj patras la senharulo*.

Kaj dum tiuj ĉi ekzercoj oni sentigu, ke Esperanto ĝenerale donas la preferon al la formulo *avas la barbulo kaj patras la senharulo*, ĉar la subjekto tendencas sekvi netransitivan verbon, krom se ĝi estas pronomo, tiam ĝi antaŭas al netransitiva verbo.

● **Henri:** Ĉu vi utiligas la komplikajn gramatikajn terminojn *transitiveco* kaj *netransitiveco*?

● **Claude:** Por vi mi uzis la adjektivojn *netransitiva*. Sed en klarigoj al la lernantoj oni komprenigu, ke verboj povas havi unu valenton aŭ esti unu-valentaj, havi du valentojn aŭ esti du-valentaj, kaj eĉ havi tri valentojn aŭ esti tri-valentaj, kiel diras la lingvistoj. Oni povas ankaŭ paroli pri verboj kun unu ligo, du ligoj kaj tri ligoj aŭ unuvaligaj, duvaligaj kaj tri-valigaj. La infanoj ŝatas paroli pri verboj kun unu brako, du brakoj kaj tri brakoj, aŭ unu-brakaj, du-brakaj kaj tri-brakaj. Grava estas ne la klarige uzata vorto mem, sed la kompreno pri la koncerna verba fenomeno.

● **Henri:** Ĉu vi povas doni ekzemplon pri verbo tri-valenta?

● **Claude:** La patrino donas pomon al sia fileto. Aŭ *Vespere la patro legas rakonton al siaj gefiloj*.

● **Henri:** Mi neniam aŭdis pri tiu trivalenteco.

Tria rolo de la verbo *esti*

● **Claude:** Kaj tamen vi flue parolas kaj skribas en Esperanto. La instruantoj devas koni tiujn ĉi gramatikajn faktojn, por povi ilin konvene instrui. Sed ni revenu al la verbo *esti*. Nur iom post iom per trastudo de beletraj tekstoj oni malkovrigu al la studentoj ĉion, kion mi ĵus klarigis al vi.

En la lernolibroj la verbo *esti* aperas ofte en frazoj kiel: *Sur la tavolo estas florpoto kaj libro*, aŭ *En la ĉambro estas lito*, *tablo kaj du seĝoj*. Vi tuj rimarkas, ke la subjekto tendencas troviĝi post la verbo *esti*, kaj ke tiu ĉi verbo *esti* nek simbologieblas per (=) nek plenumas la rolon de verbiga helpilo. Per struktur-sanga ekzercado oni povas komprenigi, ke tiu ĉi verbo *esti* estas anstataŭigebla per aliaj verboj, kiel troviĝi, stari, kuŝi, ktp...

Jen ekzemplo:

- Antaŭ la domo estas tri arboj.
- Antaŭ la domo troviĝas tri arboj.
- Antaŭ la domo staras tri arboj.
- Malantaŭ la domo estas laĝeto.
- Malantaŭ la domo troviĝas laĝeto.
- Malantaŭ la domo etendiĝas laĝeto.

Oni komprenigu, ke en tiu ĉi uzo la verbo *esti* similas al speco de dirko anstataŭanta eblajn pli precizajn verbojn. Ĝi estas kvazaŭ sensignifa verbo, kaj tial stile preferindas la uzo de pli precizaj verboj kiel troviĝi, stari aŭ kuŝi, etendiĝi, ktp... Kaj oni povas eĉ enkonduki la uzon de la duvalenta verbo trovi:

Jen ekzemploj:

- Sur la tablo estas bildoj de bestoj, kajeroj, skribiloj kaj gumo.
- Sur la tablo troviĝas bildoj de bestoj, kajeroj, skribiloj kaj gumo.
- Sur la tablo oni trovas bildojn de bestoj, kajerojn, skribilojn kaj gumon.

● **Henri:** Interesa maniero komprenigi tiun rolon de la verbo *esti*, anstataŭigante ĝin per la verbo *troviĝi* kaj eĉ per la strukturo *oni trovas + n*.

Kvara rolo de la verbo esti

● **Claude:** Tiu ĉi strukturŝanĝa ekzercado kontribuas al la akiro de lingvaj refleksoj, kiuj asimiligas gramatikajn nociojn nur per lingvo-praktiko. Sed tio kontentige disvolviĝas, nur se la ekzemploj estas bone elektitaj kaj sufiĉe abundaj. Ili kondukas al ludoj gramatike ege produktivaj. Sed pri tio ni konversaci alian fojon.

Post la malkovro de tiuj tri tre precizaj roloj de la verbo *esti*, la lernantoj pere de trastudo de beletraj tekstoj havas la okazon malkovri aliajn uzojn pli malfacile difineblajn de tiu verbo *esti*. Por ne tro kompleksigi la esplorojn, mi didaktike proponas ordigi la verbon *esti* laŭ kvar fakoj:

Unua fako: *esti*, kiu estas simboligebla per (=).

Dua fako: *esti*, kiu estas verbiga helpilo.

Tria fako: *esti*, kiu signifas troviĝi. La franglingvanoj rapide malkovras, ke tiu verbo *esti* povas tradukiĝi francan per la francaĵo *il y a* kaj la germanlingvanoj per la formulo *es gibt*.

En la kvaran fakon oni registru aliajn eblajn uzojn de la verbo *esti*, kiuj nek simboligeblas per (=), nek ludas verbigan rolon, nek anstataŭeblas per alia pli preciza verbo. Tiuj aliaj

roloj de la verbo *esti* ĉefe renkonteblas okaze de trastudo de beletraj tekstoj. Ili montras, kiom entute kompleksa estas la rolaro de la Esperanta verbo *esti*.

● **Henri:** Ĉu vi povas doni ekzemplon?

● **Claude:** Jen nur unu: *Estas la momento konkludi!* En tiu ĉi pens-unuo la verbo *esti* nek simboligeblas per (=), nek ludas la rolon de verbiga helpilo, nek signifas troviĝi.

Okaze de tralego de beletraj tekstoj vi loku mem pense la renkontitajn verbojn *esti* en konvenan fakon, kaj tiel iom post iom vi mem sentos, ke ankaŭ la kvara fako havas sian didaktikan utilon.

● **Henri:** Vi pravas. Oni bone lernas nur tion, kion oni mem malkovras.

● **Claude:** Kaj tiam oni kapablas pli konvene gvidi Esperanto-studon.

Kaj se vi amuziĝos analizi lernolibrojn rilate al la instruado de la menciitaj roloj de la verbo *esti*, tiam vi malkovros, kiom didaktike ili lamas. Kaj tio klarigas, kial multaj franglingvanoj longe diras: *Sur la tablo estas florpotoj*. Ili fakte pensas *Sur la table, il y a un pot de fleurs*. [Sur la tablo, ĝi tie havas florpotojn.] Se vi petas al ili, ke ili analizu tiun ĉi francaĵon, tiam vi konstatos, ke ne malmultaj el ili respondos, ke *un pot de fleurs* estas la rekta komplemento de la verbo *a*, kies subjekto estas la pronomo *il*. Tial la strukturŝanĝa ekzercado, kiu venigas la ekvivalentajn frazojn *Sur la tablo troviĝas florpotoj*, kaj *Sur la tablo oni trovas florpotojn*, kaj *Sur la tablo staras florpotoj* alportas al la franglingvaj lernantoj tre utilan didaktikan helpojn.

● **Henri:** Ĉu alilingvanoj renkontas similajn malfacilaĵojn kun la verbo *esti*?

● **Claude:** Tutcerte! Mi havis la okazon plurfoje instrui Esperanton al parolantoj de lingvoj, en kiuj ne ekzistas la nocio mem de la verbo *esti*. Ĉiam montriĝis, ke al ĉiu menciita rolo de la verbo *esti* tiuj lernantoj trovis tre precizan esprimoblon en la propra lingvo. En iliaj lingvoj ekzistas pli da esprim-rimedoj, ol en Esperanto. Kaj tio povas malfaciligi al ili la realan komprenon de la variaj roloj de la verbo *esti*.

● **Henri:** En venonta babildado ni nepre diskutu pri la pozitivaj flankoj de la perbildita instruado kaj pri la ebloj de la strukturŝanĝaj ekzercoj kaj ankaŭ pri la verбай valentoj. Viaj aludoj al tiuj nocioj vekis mian scivolemon.

● **Claude:** Kial ne?



Por pli vasta komunumo



Pri varbado kaj ideoj

Pri kio kutimas babili niaj pintaj funkciuloj? Jen parto de interesa dialogo inter la Prezidanto Renato Corsetti kaj la Ĝenerala Direktoro Trevor Steele.

● **Trevor:** Renato, lastatempe multaj skeptikas. Diru al mi, ĉu vi vere kredas, ke iam estos ia "fina venko"? La movado estas mikroskopa sur tutgloba skalo.

● **Renato:** Ni estas stranga speco de finvenkistoj. Ni tute bone scias, ke la fina venko ne venos venontan merkredon posttagmeze, sed tamen ni opinias, ke estas bone labori por ĝi, ĉar se oni ĉesas kredi je ĝi, ĝi ofendiĝas kaj neniam venos. Momente ni estus tute kontentaj, se ni sukcesus nur iom vastigi nian "niĉon" en la mondo. Ni vere estas adeptoj de partaj venketoj.

● **Trevor:** Vortoj, vortoj. Ĉu vi fakte ion faras?

● **Renato:** Ni fakte ja ion faras. Nia estrarano pri informado, Andrej Grigorievskij, kaj la redaktisto de ĉi tiu revuo, Stano Marček, malkovris la ekziston de komputiloj kaj faris miraklon: ili enretigis la enhavon de la revuo. (*www.uea.org.rim.de la red.)

● **Trevor:** Nu, tio estas ja io, eĉ io nova. Kiam vi decidis fari tion?

● **Renato:** Dum la lasta estrarkunsido estis deciditaj pluraj aferoj. Kelkaj estas jam komunikitaj. Kelkaj neniam estos komunikitaj, ĉar tro sekretaj (ekz. kiom da fojoj la prezidanto endormiĝis dum la kunsido).

● **Trevor:** Eĉ vi ne kapablas kaj paroli kaj dormi, Renato. Kiom da fojoj la aliaj ekdormis?

● **Renato:** Pardonu, jes, jen la sekreta informo. Sed ree al mia temo: dum la kunsido ni ekigis la kampanjon *Por pli vasta komunumo*. Nenio suprizo nova pri ĝi. Ĝi estas jam antaŭvidita en la Strategia Laborplano. Simple nun la Estraro decidis ekrealigi ĝin.

● **Trevor:** Imponaj vortoj. Parolu iom pli precize, mi petas.

● **Renato:** Kun plezuro. La kampanjo konsistas el du partoj: – la reta parto, kaj – la papera parto.

● **Trevor:** Nun vi parolas kvazaŭ juristo. Do bone, klarigu pri la "reta parto".

● **Renato:** La reta parto havas du celojn:

- utiligi efike la novajn teknikajn eblojn (abonantoj legu la revuon tuj, sendepende de la poŝta servo); kaj
- ligi al UEA (kaj al ties landaj asocioj kaj lokaj grupoj) tiujn homojn, kiuj lernas Esperanton rete kaj restas vagantaj tra la reta mondo sen kontaktoj kun la vivantaj esperantistoj.

● **Trevor:** Sed, momenton – se vi enretigos la enhavon de la revuo, kial oni ankoraŭ aliĝu al UEA?

● **Renato:** La januara numero de la revuo aperinta en la reto estas iusence nur provo por montri al maljunuloj kiel ni, ke tio estas vere ebla. Ĝi estas ankaŭ logilo por tiuj malpaperaj nur-ret-anoj, kiuj povus decidi aboni ĝin, membriĝi en UEA, ktp.

● **Trevor:** Do ia eksperimento? Sed kiel vi povos juĝi la rezulton de la eksperimento? Kiam ĝi estos juĝebla?

● **Renato:** Tra la jaro la eksperimento daŭros: ĉiumonate ni enretigos, sed en la dua, tria monatoj kaj tiel plu vi trovos en la reto nur la enhav-tabelon kaj stimulan artikolon. Parto de la eksperimento, fakte, konsistas el kalkulado kiom la retaj abonantoj devas pagi kompare kun la normalaj abonantoj.

● **Trevor:** Do la estraranoj kaj redaktisto eksperimentas. Kion faru la humilaj piedsoldatoj de la paca movado intertempe?

● **Renato:** Ankaŭ ili povas kunlabori. Se ili volas, ili povas iĝi ambasadoroj de la ret-esperanta movado en sia lando, disvastigi la informon pri la enhavo de la revuo rete, klopodi organizi reton por la esperantistoj en sia lando kaj por la komencantoj. Se ili – same kiel ni – apenaŭ kapablas salti komputilon, tamen ili povus tre utile kunlabori kun la TEJO-sekcio en sia lando. Ili serĉu tiujn junulojn, kiuj kapablas ne nur salti kaj malsalti komputilon, sed ankaŭ uzi ĝin.

● **Trevor:** Sed Renato, kiom da homoj havas aliron al komputilo? Kaj niaj fidelaj ne-plu-junaj homoj daŭre preferos la – kion vi diris? – "la paperan parton". Ankaŭ mi, ekzemple, malgraŭ mia ekstrema juneco.

● **Renato:** La papera parto havas ankoraŭ pli da celoj. Ni "paperistoj" aŭ "paperuloj", se vi volas, pretigis flugfoliojn por varbado, kiu estas uzebla de UEA, de landaj asocioj kaj de lokaj grupoj. La sama flugfolio invitas al membriĝo en ĉiuj niveloj de la Esperanto-agado. UEA aldonas al la folio siajn kotizojn kaj pag-regulojn, kaj same povas fari la landaj asocioj kaj la lokaj kluboj. La celo estas atingi per tiuj folioj ĉiujn unuopajn esperantistojn komencantajn aŭ neorganizitajn, kaj ligi ilin al la movado.

● **Trevor:** Ĉu do temas pri "desupra" agado? UEA agos – finfine,



fotoj Stano Marček

Kuraĝigu la dominikajn gekursanojn!

En Dominika Respubliko Esperanto progresas. La kursgvidanto Rafael Despradel (sur la foto) nun havas 48 gelnantojn en la unua E-kurso en la lando. La kursgvidanto organizas poŝtkartan vesperon por la kursanoj, kiuj volus ricevi mesaĝojn el almenaŭ 50 landoj.

Tiel la lernantoj vidos, ke nia lingvo estas afero tutmonda kaj ke ĝi funkcias. La poŝtkarta vespero okazos la 20-an de marto 2002. Sendintoj de la tri plej belaj poŝtkartoj ricevos premiojn: kompakt-diskon kun muziko el Dominika Respubliko.

Bv. sendi poŝtkarton al: Rafael Despradel, P.O. Box 838, Santiago de los Caballeros, Dominika Respubliko.



hural – sed la landaj asocioj, lokaj kluboj ktp. daŭrigos sian dormadon?

● **Renato:** Ne ekzistas konkurenco inter UEA, landaj asocioj aŭ lokaj grupoj. La lokaj grupoj estas la bazo de ĉio. Ili havas pli da kontaktoj kun komencantoj kaj neorganizitaj esperantistoj. Ni deziras, ke ili larĝigu sian komunumon. Tio estos utila ankaŭ por la landaj asocioj, kies "merkato" estas tiuj lokaj komunumoj, kaj tio utilas ankaŭ al UEA, kies "merkato" estas la landaj komunumoj.

● **Trevor:** Ne nur juristo, ankaŭ komercisto vi estas. Sed kiel vi intencas mobilizi viajn "vendistojn"?

● **Renato:** Baldaŭ ĉiu landa asocio ricevos la concernajn cirkulerojn. Mi petas ĉiujn, ke ili instigu sian landan asocion ne meti flanken tiun materialon, sed labori laŭ ĝi, kaj zorgi, ke la landa asocio plu-sendu kopiojn al la lokaj grupoj, ktp. Krome UEA pretas sendi malnovajn revuojn kaj la varbo-cirkulerojn al ĉiuj organizantoj de renkontiĝoj land-skale aŭ lok-skale, kiuj pretas disdoni ilin al la renkontiĝantoj.



● **Trevor:** Via entuziasmo estas laŭdinda, sed ĉu vi ne timas, ke estas tro malfrue? La giganta angla lingvo kreskas tage kaj nokte, kaj Esperanto, nu, ĝia kreskado estas, ni diru gentile, ne aparte rimarkebla.

● **Renato:** Ni konfesu, ke ĉi tiu varbokampanjo estus devinta komenciĝi multe pli frue, jarojn pli frue, sed ni klopodos regajni la perditan tempon. Ni, UEA, estas en la manoj de ĉiuj apogantoj de la ideo. Kaj ne nur ni, la plua progreso de Esperanto kaj la vastiĝo de ĝia komunumo estas en iliaj manoj. Oni ne plu plendu pri falantaj membronombroj, se la propra landa asocio ne antaŭe organizis landskalan informokampanjon kaj varbo-kampanjon.

● **Trevor:** Vere estas, ke ĉiu granda historia evoluo komenciĝis ie, iam, kaj malgrandskale. En la komenco

estis la ideo.

● **Renato:** La ideo de Esperanto meritas niajn klopodojn, nun pli ol iam ajn antaŭe. Kiel mi diris en la komenco, ni estas stranga speco de finvenkistoj.

La januara Estrarkunsido

La Estraro de UEA kunsidis de la 11-a ĝis la 13-a de januaro en Roterdamo en plena konsisto, kio ne ĉiam okazas. La kunsidojn partoprenis la observantoj de TEJO Marko Naoki Lins kaj de ILEI Maŭro La Torre.

Ĉeestis ankaŭ la Aganta Ĝenerala Direktoro de UEA, Trevor Steele, kaj la nova redaktoro de la revuo *Esperanto*, Stano Marček. Krome la Estraro invitis kaj aŭdis raportojn, opiniojn aŭ informojn de la Direktoro de la CO, Pasquale Zapelli, la ĝisnuna redaktoro de la revuo *Esperanto*, István Ertl, Konstanta Kongresa Sekretario Nikola Rašić kaj oficisto pri financo Marvin H. Stanley. Dum vesperaj horoj, post la estrarkunsidoj, kunsidis ankaŭ la estrara Komisiono por CO, kiu raportis al la Estraro.

Dum la estrarkunsidoj en vigla diskuto sed harmonia atmosfero estis fintraktita tre ampleksa tagordo kiu konsistis el 17 eroj kaj nenombreblaj suberoj.

Nek eble nek necese estas prezenti ĉi tie ĉiujn detalojn de la estrara laboro. Mi provas konigi al vi nur la temojn kiuj supozeble pleje vin interesas.

1. La nova Aganta Ĝenerala Direktoro eklaboris la 1-an de januaro. Li iom post iom eniras la problemojn kaj ni esperas ke li sukcese laboros por ilia solvado. Dum la komenca

periodo li povos havi necesajn informojn de la Direktoro de la CO.

Ankaŭ la nova redaktoro de la revuo *Esperanto* Stano Marček ekfunkciis. La januara numero de la revuo estas preta. La februara estas preparata. Ni planas per la marta numero kapti la aperitmon tiel ke la abonantoj ricevados la revuon komence de la apermonato. Laŭ la aranĝo kun la redaktoro li komplete prespretigos la revuon eksteroficeje: li redaktos, enpaĝigos, grafike aranĝos, pretigos la revuon por presado kaj interrete forsendos ĝin al la presejo, kiun decidis la CO.

La Direktoro de la CO, Pasquale Zapelli, jam elektis Ionel Onet nova oficisto kiu prizorgos la libroservon. Li eklaboros tuj kiam la CO havigos por li laborpermeson. Komence lin enkondukos en la laboron la ĝisnuna oficisto gvidanta la libroservon, Simo Milojević, kiu prokrastis pensiigon ĝis la fino de 2002. Parton de sia labortempo S. Milojević dediĉos al la Biblioteko Hodler, ĝis nun neglektata.



Resume: En 2000 en la CO laboris entute 12 geoficistoj, el kiuj 2 neplentempaj. El ili 3 jam foriris (ĝenerala direktoro, purigado, provlegado) kaj du el ili jam estas anstataŭigitaj (ĝenerala direktoro, purigado), dum la porrevua laboro de la redaktoro eksteroficeja. Unu el la for-irintoj (la ĝisnuna redaktoro) ankaŭ estas jam anstataŭigita kaj liaj liberigitaj laborkapablo kaj kvalitoj povas esti uzataj dum la restanta tempo por plenumi aliajn necesajn taskojn de la Asocio. Por la dua forironto (la libroservo), kiu tamen restos ĝis la fino de la jaro, ni jam havas anstataŭanton, kiu espereble ekfunkcios tre baldaŭ. Ankaŭ tiel liberiĝas laborkapacito uzebla por aliaj taskoj.

Momente estas la plej grava problemoj la baldaŭa foriro de la direktoro de la CO. Pri la taskoj kiujn li plenumis estos necese decidi kiam ni havos kompletan bildon pri la strukturo de la CO konformiga al la bezonoj de la Strategia Laborplano, pri kio intense okupiĝas la Komisiono por CO. Ĝis tiam necesos parte reorganizi la plenumadon de liaj ĝisnunaj taskoj kaj parte engaĝi eksteroficejan plenumanton (prizorgado de la ekzistanta komputila sistemo).

Do, post foriro de la oficistoj kiuj tion anoncis kaj post eklaboro de la jam elektita nova, la stabo en la CO nombros ok personojn, kiuj tamen devos plenumi malpli da taskoj ol ĝis nun (el la taskaro momente forfalis redaktado de la revuo, grafiko porrevua, provlegado kaj alispeca prizorgo de la revuo, kiuj ĝis nun okupis unu kompletan oficiston kaj grandan parton de aliaj).

Kompreneble la demando pri nove dungotaj oficistoj ne finiĝis. La komisiono pridiskutis kun la Aganta Ĝenerala Direktoro la estontajn bezonojn de la Asocio. Ĝi ankaŭ komencis starigi kalendaron por kompletigi la procedon por elekti definitivajn okupantojn de la oficoj de ĝenerala direktoro kaj redaktoro.

2. Komisiita de la Komitato, la Estraro pozitive traktis la proponon de EEU fondi Komunikadan Centron en Bruselo. UEA garantios la kovron de elspezoj ĝis sumoj maksimume fiksitaj por la jaro 2002 kaj 2003.

Kompense UEA rajtos uzi la Centron por informaj laboroj specifaj por UEA. Detaloj estos ankoraŭ traktataj kun EEU.

3. Malfermo de komunikada centro en Bruselo igas ankoraŭ pli aktuala la demando pri la estonta sidejo de UEA. Ĉu ni restu en Roterdamo en nia nuna domo aŭ ni translokiĝu en alian domon ekzistantan aŭ konstruotan en Roterdamo mem, aŭ al alia nederlanda urbo aŭ alia lando? La Komisiono pri CO decidis skizi la diversajn eblecojn tiurilatajn por malfermi diskuton en la Asocio.

4. Surbaze de la invitoj de la respektivaj landaj asocioj la Estraro principe decidis okazigi la universalajn kongresojn en 2004 en Pekino, Ĉinio kaj en 2005 en Vilnius, Litovio.

Fine mi dankas al ĉiuj kiuj fidante kaj pacience sekvis la laboron de la Komisiono por CO kaj de la Estraro en plenumado de la taskoj kiujn starigis antaŭ ĝi la asociaj Statuto, regularoj kaj Komitato. Mi esperas baldaŭ informi vin pri la planoj en unuopaj estraranaj fakoj kiel realigi la Strategian kaj la Trijaran Laborplanon.

Ivo Osibov

FOTOJ:

Maldekstre sube: Holger Boos, Christopher Culver; Lee Chong-Yeong, Gbeglo Koffi, Maŭro la Torre. Dekstre supre: Ans Bakker-ten Hagen, Lee Chong-Yeong Gbeglo Koffi; Andrej Grigorjevskij; Michela Lipari; Nikola Rašić. Meze: Ans Bakker-ten Hagen; Marko Naoki Lins; Nikola Rašić (post li Marvin H. Stanley); Pasquale Zapelli.

Sube: Till Schönberner, Ilja De Coster; Humphrey Tonkin, Trevor Steele; Ivo Osibov, Renato Corsetti, Andrej Grigorjevskij.

(fotoj: Stano Marček)





Bondeziroj el Barcelono

Gekursanoj de la supera Esperanto-kurso de Barcelona Esperanto-Centro en Hispanio deziras al la esperantistaro Prosperan Novan Jaron!



La gekursanoj sur la bildo fiere montras sian legolibron *Esperanto en la 21-a Jarcento*, verkitan de Lee Chong-Yeong, Giordano Moya kaj naŭ aliaj gastkontribuantoj. Ĝi estas uzata en la supera kurso de BE-C kiel vere taŭga metodika helpilo kaj riĉenhava legaĵo por niaj estontaj aktivuloj.

La verko, eldonita de Korea-Esperanto-Asocio sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio, donas sobran rigardon al la sukcesoj, pozicio, ŝancoj kaj defioj de nia lingvo kaj movado en la 21-a jarcento. Ĝi montras la edukajn kaj propedeŭtikajn valorojn de Esperanto en la erao de disvolvigitaj komunikadaj teknologioj kaj interreto, kaj provizas la gekursanojn per multaj scioj kaj argumentoj pri niaj aferoj.

Inter la gekursanoj (maldekstre) estas la prezidanto de BE-C, Salvador Aragá.

Biblioteko de Interlingvistiko

360-paĝa katalogo, konsultebla ankaŭ rete, estas la impona rezulto de la laboro de Andreo Montagner, kiu dum du jaroj prizorgis la Bibliotekon de Itala Interlingvistika Centro, nun gardata de la Lingva Fakultato de Milana Universitato.

La Bibliotekoj oficiale inaŭguris Fabrizio Pennacchietti, profesoro pri interlingvistiko kaj esperantologio en la torina universitato, Tiziana Rogora, prezidantino de IIC, kaj Giorgio Silfer, membro de la scienca komitato de IIC, en la ĉeesto de la akademiaj aŭtoritatoj. Sen. Rogora skizis la historion de la biblioteko, fondita kun la Centro mem en 1985, kaj dum pli ol dek jaroj gardita en Cernusco, apud Milano. Prof. Pennacchietti retrospektivis kaj perspektivis pri la universitata instruado de interlingvistiko kaj esperantologio. D-ro Silfer prezentis la evoluon de la nova scienco-

branĉo en Italio. La universitato kunlaboras kun Itala Interlingvistika Centro por pliaj projektoj, favore al la scienca studo pri Esperanto. (HeKo)



foto: Andrzej Sochacki

E kore brui

La lasta Ago-Tago en la urbocentro Santa Cruz de la brazila metropolo Rio-de-Janeiro, organizita de EKOR, Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono, fariĝis plua E(I)KOR-a kaj brua reklamkampanjo. (R. Estevo)



foto: Remi Lewandreska

Grupe ĝui

En novembro 2001 okazis "GRUPE-5", Glivice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto en Pollando.

Ĝi ebligis al la aŭtoro de la Pola-Esperanta vortaro K. Strzelecki renkontiĝi kun Alicja Lewandreska (dekstre, sur la suba foto de Remi Lewandreski) kaj geamikoj el Pollando, Ukrainio kaj Germanio. Maldekstre: koncerto de la koruso KAMEA kontribuis al la valora programo de la aranĝo (legu pli en la januara revuo).

(A. Sochacki/A.Lewandreska)

foto: M. Galofré



Finiĝis kurso en Sabadell

En aŭlo de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono finiĝis en decembro 2001 trimonata kurso de Esperanto.

La kurso, kiun organizis Kultura Asocio Esperantista de Sabadell, partoprenis 24 ĝejunuloj. Sur la (supra) foto, krom la kursanoj, videblas profesoro Martin Guerrero i Cots kaj la prezidanto de KAE José M^a Galofré. Pri la kurso raportis la 15-an de decembro ankaŭ la loka ĵurnalo *Diari De Sabadell*.



Jarfina festo en Vieno

Okaze de la 142-a naskiĝdatreveno de d-ro L. Zamenhof jam la 50-an fojon kunvenis esperantistoj kaj simpatiantoj en la Salonego de la Viena Pola Instituto.

Kadre de la programo estis eblo spekti novan ekspozicion de la Pola Instituto, kies titolo estas: *Nia Eŭropo*. Ĝi estas komuna laboro de la Vienaj Internaciaj Artistoj.

La feston mem ĉiam kadras koncerteto post la kutimaj salutvortoj de la direktoro kaj prezidanto de Aŭstria Esperanto Asocioj. Ĉi-foje, pro malsano de direktoro Buras, la vicedirektoro de la instituto salutis kaj enkondukis la feston. Post li d-ro Hans Michael Maitzen nome de la aŭstria esperantistoj salutis la ĉeestantojn. La koncerteton prezentis juna pola pianistino studenta en Vieno Agata Nowakowska.

Ne mankis la kutima festparolado, kiun ĉi-foje faris mi, pri la okazintaĵoj de la ĵus forpasinta jaro de la Lingvoj. Ĉar ĵarfino ĉiam iniciatas fari konkludojn de la okazintaĵoj, mi koncize rememorigis pri la aranĝoj kadre de Eŭropa Esperanto-Unio kaj organizitaj nialande.

Fine de la festo la publiko spektis videofilmojn: *Pollando, unu lando plena de aventuroj* kaj filmojn pri la bieno *Bona Espero* de Roman Dobrzyński, pruntitan el IEM en Vieno.

Post la programo la Pola Instituto Regalis la ĉeestantojn, iniciatinte amikan kunestadon kaj babiladon de la partoprenantoj, kiuj ĉi-foje venis krom el la najbaraj Ĉeĥio kaj Slovakio ankaŭ el Pollando, Bulgario kaj Japanio. Memkompreneble estas tre valora la

kune pasigebla tempo, ĉar tiam eblas interŝanĝi spertojn kaj informojn pri la proprlanda Esperanto-agado.

Renato Corsetti

La kolombia

Kvardeko da ĉeestantoj partoprenis la 7an Kolombian Kongreson novembre 2001 en la bela vilaĝo Fusagasugaj.

Okazis brilaj prelegoj, estis prezentita amatora filmo de Rikardo Carrillo, sukcesaj artaj vesperoj antaŭ granda publiko plenis la teatron de la Universitato kaj fariĝis strategia programero por varbi novajn interesiĝantojn.

Veran prioritaton havis diversaj diskuttrondoj. Loka

infanĝrupo prezentis folklorajn dancojn, ludis orkestro de la Universitato, okazis pupeteatro, estis prezentita teatraĵo fare de la grupo de Cali, dancis Nohora Gaitán, kunsidis la Nacia Junulara Grupo. La prelegoj de Prof. Santos, Geraldo Mattos, Guido kaj Sabina Ricci instruis multajn aferojn al la kongresanoj. Al la sukceso de la kongreso, kies diskuttemo estis *Taŭgaj strategioj por la disvastiĝo de Esperanto*, kontribuis partopreno de multaj junuloj, el kiuj granda parto nur nun komencis lerni Esperanton.

Santiago Alvarez

Jubilee en Rio-de-Janeiro

La 25-an de decembro 2001 okazis en la brazila metropolo Rio-de-Janeiro la XV-a Renkontiĝo de Okcidenta Regiono (EKOR).



En la jubilea renkontiĝo, ĉar EKOR (Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono) en tiu dato deĵariĝis, partoprenis pli ol 190 esperantistoj. La renkontiĝo okazis ĉe la lernejo Abrigo Nazareno, kvartalo Campo Grande.

Celso Pinheiro



foto: Celso Pinheiro

Verda Gastejo

En Niterói, najbara urbo al Rio-de-Janeiro (20 minutoj per ŝipo!) estis ĵus inaŭgurita la *Gastejo La Verda Stelo*.

La iniciatinto estas nia samideano Maria das Graças Carap kaj la celo estas precipe ebligi malmultkoston gastigadon al landaj kaj alilandaj esperantistoj, kiuj volas viziti la "Mirindan Urbon" (Rio-de-Janeiro) kaj la same belan Niterói, kun ĝiaj belegaj plaĝoj kaj la fama Muzeo pri Nuntempa Arto (arta kreaĵo de Niemeyer).

La ordinara tranokto kostas R\$ 25,00 (por neesperantistoj) kaj nur R\$ 20,00 (por esperantistoj), kun rajto je matenmanĝo kaj littuko.

Por la kamavala periodo ekzistas speciala plano: R\$ 200,00 por neesperantisto (5-taga restado) kaj R\$ 150,00 por esperantisto.

Por pliaj informoj vin turnu al *Maria das Graças Carap, Rua Lara Vilela, 167, Iná, Niterói, CEP 24210-590*, aŭ per la telefonoj 2719-8174 kaj 2620-3660, aŭ per la retadreso <carap@nitnet.com.br>

Aloísio Sartorato

Reĝo Lear en Hanojo

Por pozitive respondi al la Plano de Lingva Demokratiigo lanĉita de UEA, en Hanojo, la Urbo de l' Paco, rekonita de Unesko, ekfunkciis amatora artisma E-klubo Verda Cigno. Ĝia iniciatinto estas la poeto Dao Anh Kha, honora membro de UEA.

La ĉefa celo de la klubo estas levi per valoraj rimedoj de poezio, muziko, kantado kaj teatro la lingvokonojn de la vjetnama esperantistaro kaj kontribui al perspektiva okazigo de la universala kongreso en Vjetnamio.



La Verda Cigno, okaze de la 142-a naskiĝdatreveno de d-ro Zamenhof kaj la 45-a jubileo de VEA, okazigis sukcesan dulingvan prezenton de la tragedio *Reĝo Lear* de Ŝekspiro. La fama vjetnama poeto kaj ŝekspirologo Dao Anh Kha vjetnamigis la tutan tragedion kaj prozigis la faman versan tradukon de Kolomano Kalocsay. La prezentado entuziasmis la asocian membraron kaj vekis grandan intereson ĉe literaturaj kaj kulturaj medioj de la vjetnama ĉefurbo kaj eĉ de radio kaj televido.

Lai Thi Hai Ly



Kurso de Esperanto por vjetnamaj studentoj, gvidata de la vjetnama veterano Dang Dinh Dam. La foto estis farita la 9-an de decembro 2001, okaze de la 45-jara jubileo de la fondo de VPEA en Hanojo.

foto: DDD

Interlingvistikaj Studoj

La trijaraj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en Universitato Adam Miczkiewicz, Poznan (Pollando), atingis la unuan fojon sian lastan, t.e. la sesan sesion (26-30.01.2002).

La unusemajna sesio en ĉiuj semestroj kunvenigas la internacian partoprenantaron (el Ĉeĥio, Germanio, Belgio, Makedonio, Svedio, Usono kaj Pollando) por aŭskulti superrigardajn prelegojn pri interlingvistiko, esperantologio kaj pri ĝenerala kaj aplikata lingvistiko.

En ĉiu semestro unu-du konataj kaj elstaraj eksterlandaj fakuloj estis invititaj por gvidi la kursojn. Ĉi foje

d-ro Detlev Blanke (Humboldt Universitato, Berlin, Germanio) prelegis pri la nuntempa stato de interlingvistiko kaj ĝia rolo en eŭropa lingvopolitiko, krome li prezentis la terminologian agadon de Wüster.

Prof. Humphrey Tonkin (Universitato de Hartford, USA) donis superrigardon pri la E-movado de la komencoj ĝis nun, ĉerpante ankaŭ el siaj riĉaj travivaĵoj. pliajn ok horojn li dediĉis al la analizo de Esperantaj poemoj.

La unuaj tagoj estis malfermitaj al pli granda publiko. Tial alvenis ankaŭ Georgo Handzlik, kiu kantis al la partoprenantoj kun gitarakompano lunde vespere, post la scienca programo, dum la tradicia ĉina vespermanĝo ĉe Tintilo kaj Joakimo Werdin.

Pri la sesio raportis regionaj radiostacio kaj televido WTK. La televida stabo filmis fragmenton el la kurso de Blanke, intervjuis Tonkin kaj partoprenantojn, poste invitis Ilona Koutny, la gvidantinon de la Studoj por ensordia interparolo. Entute 10 minutoj de la vespera novaĵprogramo estis dediĉitaj al la eŭropa lingvoproblemo, Esperanto kaj interlingvistika sesio.

La direktoro de la Lingvistika Instituto invitis la prelegantojn por tagmanĝo. Tonkin kaj Koutny renkontiĝis ankaŭ kun vicrektoro de UAM en agrabla etoso kaj interparolis i.a. pri eventuala kunlaboro en la tereno de interkultura komunikado.

Ilona Koutny

Unesko-agado

Dum la jaro 2001 okazis multaj ŝanĝoj en nia Uneska agado.

Philippe Bérizzi iĝis reprezentanto de UEA ĉe Unesko kaj ILEI nomumis Renée Triolle kaj Jean-Pierre Boulet kiel siajn reprezentantojn.

Vincent Charlot konstante ĉeestis kunvenojn de du komisionoj de Ne-Registaraj Organizoj (NRO-j) ĉe Unesko pri *Homaj Rajtoj kaj Tolerado* kaj pri *Komunikado kaj Novaj Teknologioj*. Li protokolas por la unua komisiono. Dank'al tio, Philippe Bérizzi profesie kontaktiĝis pri projekto de ludo.

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA, venis dufoje Parizon en aprilo kaj oktobro 2001. Li povis tiukaze renkontiĝi kun gravaj Uneskuloj. La plej grava rezulto estis ke ĉeestis ambasadorino de Kroatio en la Zagreba UK. Ŝi Esperante salutis la UK-on. Kroatio prezentis poste rezolucion pri Esperanto en la Ĝenerala Konferenco de Unesko.

Pluraj gravaj kampanjoj de UEA rilate Uneskon startis dum 2001 post nia sukcesa partoprenado en kampanjo *Manifesto 2000* por kulturo de paco. UEA aliĝis al Movado por kulturo de neperforto kaj paco profite al infanoj de la mondo (2001-2010) kaj havas rektan ligan kun TTT-paĝoj de Unesko. UFE akiris "subkonton", kiu permesas al ĝi afiŝi tekstojn kaj anoncojn en tiuj TTT-paĝoj.

Per-rete, Vincent Charlot sendis al ĉirkaŭ 60 Naciaj Komisionoj por Unesko kaj Ministerioj etan demandaron pri la stato de Esperanto-instruado kun la Uneska rezolucio de 1985 kaj retadreso de la koncerna landa asocio de Esperanto. Tiun leteron ellaboris Renato Corsetti, Vincent Charlot kaj aliaj samideanoj. La mesaĝojn tradukis samideanoj en naciajn lingvojn (angla, ĉeĥa, franca, hispana, itala, norvega, portugala, rusa). Ni ricevis ĉirkaŭ dudekon da respondoj, kelkaj estis tre pozitivaj.

Tiu kampanjo ampleksigindas. Kadre de tiu kampanjo, la Sekcio de Ministerio pri Nacia Edukado respondis kaj estiĝis kontaktoj kun ministerio kaj franca nacia komisiono pri Unesko.

Ĉefaj gravaj eventoj por Unesko kaj komunumo de Uneskaj NRO-j estis Forumo de Junularo (12-14/10/2001, la 31-a Ĝenerala Konferenco (15/10-3/11/2001) kaj Internacia Konferenco de Ne-Registaraj Organizoj (12-15/12/2001).

François Hoeltzli (de JEFO) partoprenis la junularan Forumon, en kiu ĉeestis ĉ. 300 junuloj kaj oficiale reprezentis tie TEJO-n.

Komunikada Centro en Bruselo

Baldaŭ en Bruselo aperos Komunikada Centro, kiun intencas starigi Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) kunlaboro kun kelkaj eŭropaj E-asocioj. Ĝi situos maksimume proksime al eŭropaj instancoj, fondaĵoj, miloj da diverslandaj ĵurnalistoj kaj internaciaj neregistaraj organizoj.

La celo de la Centro estos profesinivele informi la eŭropajn kaj ankaŭ tutmondajn amaskomunikilojn pri la lingvaj problemoj kaj faktoj de lingva diskriminacio, sekve de tio proponante informojn pri la ekzistanta solvo prezentata de Esperanto.

La motoro de la ideo kaj la ĉefa laborforto en la komenca stadio estos brusela ĵurnalistoj David Fergusson, kimrodevena irlandano, bone orien-

tiganta en la brusela Babelo. Dum la januara estrarkunsido de UEA estis akceptita decido provizi la Centron per garantita sumo de 19 mil eŭroj, tiel ebligante ĝian baldaŭnan ekfunkcion.

Tio estas granda parto de la antaŭvidata ĉi-jara buĝeto de BKC, la ceterajn rimedojn devos kontribui Eŭropa E-Unio, Flandra E-Ligo, Esperanto Nederland kaj aliaj kunlaborantaj asocioj.

(GaKo)

En la 31-a Ĝenerala Konferenco de Unesko Michèle Abada-Simon, Vincent Charlot kaj Renato Corsetti reprezentis UEA-n. ILEI-n reprezentis Jean-Pierre Boulet kaj Renée Triolle. Renato Corsetti povis tiam renkontiĝi kun gravuloj de Unesko. Vincent Charlot intervenis dufoje tri minutojn kadre de Komisionoj kaj ankaŭ en kunveno de NRO-j.

Kroatio oficiale prezentis rezolucion pri Esperanto. Ĝenerala Konferenco indikis, ke ĝian enhavon pri subteno al plurlingveco kaj al minoritataj lingvoj reprenis amendo de Plenum-Konsilio.

Nia organizo akiris famon de seriozeco kaj malfermiteco. Menciindas, ke la libro *Homaj Rajtoj*, Esperante tradukita kaj eldonita de UEA, estis ekspoziciata dum la tuta Ĝenerala Konferenco.

La Ĝenerala kunveno de Uneskaj NRO-j okazis inter la 12-a kaj la 15-a de decembro 2001. Vincent Charlot reprezentis UEA-n, Jean-Pierre Boulet kaj Renée Triolle ILEI-n. UEA prezentis kandidatecon de Vincent Charlot al la Ligkomitato, sed ni retiriĝis pro multeco da tre kompetentaj kandidatoj. Estis nur tri eblaj postenoj por NRO-j en konsultaj rilatoj en tiu konsilio. Pluraj NRO-j bedaŭris nian elekton kaj kvar voĉdonis por ni, kvankam ni ne estis kandidatoj. Jean-Pierre Boulet kaj Vincent Charlot intervenis dum kunsidoj.

Unesko multe emfazis la neceson, ke niaj landaj asocioj kontaktigu kun Naciaj Komisionoj por Unesko. Ni ekkontaktis la francan, por ke UFE iĝu partnero de la franca Komisiono por Unesko.

Vincent Charlot

E-Tagoj en la pola Krakovo

okazis la 8-an kaj 9-an de decembro 2001 kun riĉa kultura programo. La partoprenantoj salutas nin de la memortabulo sur la strato de L. L. Zamenhof



Tri generacioj festivale

Jam la dek-okan jaron sinsekve kolektiĝas esperantistoj, plejparte familioj, por pasigi la novjaran semajnon en komuna familiaĉa arango – la Internacia Festivalo (IF).



Ĉi-jare ĝi okazis en la urbo Magdeburg, sudokcidente de Berlino. Proksimume ducent partoprenantoj el dudek landoj kune amuziĝis, ĝuis preleĝojn kaj distran programon. Iom simila arango al tiu de la Universala Kongreso, sed kun komunaj loĝejoj kaj manĝoj, celita por mezaĝuloj kaj precipe por familioj: mezaĝuloj kaj junaj infanoj.

La paralelan arangan por gejunuloj, la Internacian Seminarion (IS), kiu ĉi-jare okazis en la urbo Rotenburg apud Bremen, partoprenis ĉirkaŭ kvarcent gejunuloj. Historie, ambaŭ arangoj havis komunan originon, same nomataj IS, kiu antaŭ 18 jaroj disiĝis al la du paralelaj arangoj laŭ aĝa-generacia divido.

Kvankam la kadra programo de ambaŭ arangoj havas similajn elementojn kiel preleĝoj, tuttaga ekskurso kaj silvestra balo, nature ilia karaktero estas diferenca: en la IF oni pasigas la tempon en preleĝoj, ludoj, distraj programoj kaj kompreneble sociumante en la trinkejo, kiu en la IF-jargono nomiĝas *Knaĵpo*. Kvankam similajn programojn ofertas ankaŭ la IS (kio ĉi-jare ĉeftemis pri *Eŭropa unuigo: idealo kaj realo*), granda parto de la IS-anoj plej ofte troviĝas en la dancejo (diskejo, en la IS-jargono), trinkejo, aŭ intima kafejo (jargone *gufujo*, aludante pri ĝiaj noktaj klientoj). Multaj IS'anoj dancas aŭ gufumas la tutan nokton kaj dormas nur inter la maten-kaj tagmanĝo.

Ofte esperantistaj familioj disiĝas dum la ĵarfina semajno: la gepatroj kaj la junaj infanoj partoprenas en la IF, dum la pli aĝaj infanoj (ekde la aĝo de 15-16) turnas sin al la IS.

Kio logas ilin ĉiujare reveni al la IF (aŭ al la IS)? Partopreninte proksimume dek IF-jn kaj antaŭe IS-jn, mi havas la impreson ke estas unuagrade la socia sperto de amika rondo, la tiel nomata *verda familio*. Sperti ĵarfinan riĉan programon kun bonaj geamikoj kaj konatoj estas rava sperto, kiun oni ĉiujare sopiras ripet.

La IF havas la aldonan perspektivon de familia arango, kiu provizas taŭgan Esperantan medion por la infanoj. La programo de la IF estis varia kaj abunda (eble tro abunda, ĉar ĉiam okazis kvar ĝis ses programeroj samtempe): oni povis sekvi la kadratan temon *Unu Mondo – Kvin Kontinentoj* per preleĝoj pri *Tutmondigo* kaj pri diversaj landoj kaj mondpartoj: Afriko, Kroatio, Dagestano, Brazilo, Israelo, Siberio kaj Venezuelo.

Aliaj preleĝoj rilatis al E-o: *Instruado de E-o, Komunikado, E-o kaj komputilo, Pasporta Servo* kaj la *Tri generacioj de E-o*. Pliaj preleĝoj tuŝis ĝeneralajn temojn, kiel *Interkultura ĝeneracio, Puŝkin, Astronomio kaj la mondo post la 11a de septembro*.

Oni povis gustumi uzbekan manĝon, praktiki jumeiĥo-terapijon kaj ekbabili en



la portugala, por prepari sin al la venonta UK en Brazilo.

La infanoj havis paralelan programon: en la *Ludejo* por la plej junaj kaj en la *Klubejo* por la iom pli aĝaj (7-14 -araj).

En la vesperoj okazis arta kaj distra programoj: magia vespero de Trixini, koncerto de Mikaelo Bronŝtejn, koncerto de Elena Puĥova, kviza vespero kaj kompreneble la ĉiujara kulmino – la silvestra bufedo kaj balo, dum kiu oni ĉiujare salutis la novjaron laŭ la noktomezo en la diversaj horzonoj de la partoprenantoj: je la 10-a en Rusio, je la 11-a en Litovio kaj Israelo, noktomeze por ĉiuj, je la 1-a en Anglio.

La lasta vespero estis la internacia, kiun sekvis spontanea adiaŭa nokto en la Knaĵpo – komune trinkante kaj kantante oni deziris revidon post 51 semajnoj en la venonta IF, aŭ ankoraŭ pli frue ie en Esperantujo.

Amri Wandel

CDELI pozitive

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia ĉe la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds, Svislando travivas tre pozitivajn evoluojn.

La unua kaŭzo estis la vizito de Herbert Mayer, la direktoro de la aŭstria Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Dum kunsido kun Jacques-André Humair, la direktoro de la Biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, li anoncis, ke IEMW atentigos la interretajn konsultantojn de siaj kolektaj pri la ekzisto de la kolektoj de CDELI. Kaj decidigis la reciprokeco fare de CDELI por la kolektoj de IEMW.

La dua favora evento estis la aktiva help-kontribuado de la bibliotekistino Martine Schneller, kiu post staĝo venis labori en CDELI. Ekde julio ŝi intimiĝis kun ĉiuj sekretoj de la RERO-katalogado, kaj jam ekde aŭgusto interretaj konsultantoj povis malkovri la ekziston de libroj de la CDELI-kolekto.

Tria favora puŝo estis la adopto de la unika karaktero, kio ebligas skribi E-ajn vortojn kun supersignitaj literoj.

La malfondo de Gastejo Edmond Privat, kiu venigis al la komunumo La Chaux-de-Fonds kelkajn milojn da frankoj favore al CDELI, kaŭzis kvaran favoran helpon por la instalado de la komputiloj.

(Serĉi rete librotitolojn en CDELI eblas jene: www.rero.ch, klikiu.Neuschâtel.katalogue.BPUN/BVCF. Se vi interesiĝas ekz. pri ekspedicio per balono al poluso, tajpu ekspedicio, balono aŭ poluso kaj ordonu serĉi).

C. Gacond kaj M. Schneller (laŭ SES informas)

Oficiala informilo



NOVA DUMVIVA PATRONO

Francio: Raymond Boré.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brazilo: Valdemagno Silva Torres. **Ĉinio:** Wang Jing Rong. **Finnlando:** Anna Ritamäki. **Germanio:** Didier Izacard, Peter Kühnel, Peter Roether. **Israelo:** Jehoŝua Tilleman. **Japanio:** Mitukawa Sumiko. **Svedio:** Martin Weichert. **Usono:** Marc Shafroth.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): **Usono:** Jacob B. Schwartz. SUBTENANTOJ (minimumo \$25): **Hispanio:** L.E. Hernández García; R. Uruña de Hernández. **Usono:** Antonio Gomez; George W. Partlow. AMIKOJ (minimumo \$10): **Usono:** Enrique Ellemberg; D. Gary Grady; Jerry Johnson; June Knudsen-Fritz; Ronald J. Glossop; Stefan Slak; Elson B. Snow.

PATRONOJ DE TEJO 2002

Argentino: Atilio Orellana Rojas; Rodolfo G. Calógero. **Belgio:** Antoine J. Mechelyncq; Clara Bracke; Grégoire Maertens. **Finnlando:** Anna Ritamäki; Heta Kesälä; Akseli Kirsilä; Anja Karkkainen; Tiina Oittinen; Päivi Saarinen. **Francio:** Corinne Daudier; Henriette Cortes; Jacques Ferroul; Pierre Cheynet. **Germanio:** August Franke; Franz Knöfel; d-ro Rokuro Makabe; Maria Vitaylos. **Israelo:** Jehoŝua Tilleman. **Italio:** Gianfranco Polerani; Gustavo Zanolli. **Japanio:** S-ro Fukumoto Hirotsugu; Kazuyuki Hosomi; Koichi Kai; Utako Kobayasi; S-ro Kodama Hiroo; S-ro Simada Sunao. **Nederlando:** F. J. Pieterzon-Kruger; Miny Massar-van Diepen; W. L. van Leeuwen. **Svedio:** Wim Posthuma. **Usono:** Doris V. Vallon-Wheeler; June Knudsen-Fritz; R. Paul Lynch; L.A. Walther.

SOCIETO ZAMENHOF 2001

Slovenio: Jožica Zidanik.

SOCIETO ZAMENHOF 2002

Argentino: Rodolfo G. Calógero. **Aŭstralio:** Stan J. Bruton; Teresa M. Metherall. **Belgio:** Elfriede Ernst; Grégoire Maertens. **Brazilo:** Marija Pozder Almada; Alvaro Rabelo. **Britio:** d-ro John C. Wells. **Danio:** Ejnar Hjorth. **Finnlando:** Heta Kesälä; Kristiina Huttamäki; Liisa Bergman; Meri Lehtinen; Synnöve Mynttinen; Veikko Tikkanen. **Francio:** André Albault; Corinne Daudier; André Gilles; Henriette Cortes; Hélène Gaudicheau; Jeannine Croze; Jean Gibaux; Odette Bernet; Raymond Boré; Julien Ducrocq; François Bartsch; Sonia Amariglio. **Germanio:** August Franke; Alexander Putze; Harry Bily; Bruno Vogelmann; Heinz Schindler; Heinrich Nischwitz; Helga Erhard; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut Klünder; d-ro Rokuro Makabe; Michael Scherm; Werner Bormann. **Hispanio:** Joseph Franquesa Solé; L.E. Hernández García; R. Uruña de Hernández. **Japanio:** Kyotaro Deguti; S-ro Fukumoto Hirotsugu; Kazuyuki Hosomi; S-ino Kikusima Kazuko (Krizantemo); Kyōhei Nakazima; Nobuo Sakurai; Wilhelm Schmid; Kōiti Simizu; S-ro Simada Sunao; Nobuyuki Syōzi; S-ino Syōzi Keiko; S-ro Takeuti Yosikazu; S-ino Saitō Tume. **Kanarioj:** Lauren-

tina Parada De Palacios. **Korea Respo:** D-ro Kim Young Myung. **Luksemburgio:** Brian R. Moon; Claude Nourmont. **Nederlando:** G.A.M. van Bergeijk; E. C. Klaver; Sija van Wijngaarden; S. van Westrhenen; Miny Massar-van Diepen. **Norvegio:** Kjell Peder Hoff; Tamiko Kawakami-Nielsen; Tomas Jansson. **Slovenio:** Jožica Zidanik. **Svedio:** Sten Axel Broman; Gunnar Olsson; Martin Häggström; K.G. Lennart Lagerkrantz; Leif Holmlund; Sam Fritz; Tore Johansson. **Usono:** Bruce Arne Sherwood; Alberta Seabold Casey; David Wolff; Doris V. Vallon-Wheeler; D. Gary Grady; d-ro Humphrey Tonkin; Jane Edwards; Lucille C. Harmon; Margaret L. Barkley; Milton O. Brown; Robert A. Swenson; Reginald Jaderstrom; William R. Hamson.

DONACIOJ 2001 (EUR)

Ĝis la 30-a de novembro

Asocia Kapitalo: Nederlando: Heredaĵo M.-L. Enström, Sumo 31447.31. **Sumo ĉi-jara:** 37117.21. **Fondaĵo Afriko:** Anonime 1678.99. **Brazilo:** R. Conde 26.32. **Sumo en 2001:** 5218.44.

Fondaĵo Ameriko: **Usono:** C.D. Freeman 52.51. **Sumo en 2001:** 4626.33.

Fondaĵo Azio: **Japanio:** H. Gotou 18.06; H. Inumaru 18.06; H. Miedema 18.06; S. Mitukawa 45.14; M. Nakatu 18.06; T. Nomura 18.06; H. Onda 27.09; T. Saitou 36.12; K. Sanpei 18.06; K. Syozi 90.29; T. Tadaisi 18.06; Takehanato 45.14. **Usono:** J. Brozovsky 18.06. **Sumo en 2001:** 2169.50.

Fondaĵo Kanuto: **Nederlando:** A.E. Moerbeek-Prins 45.38; R. Moerbeek 50.00. **Sumo ĉi-jara:** 2166.52.

Junulara Fondaĵo: **Germanio:** H. Muhsal (PS) 20.00. **Sumo en 2001:** 61.15.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: **Nederlando:** R. Moerbeek 20.00. **Sumo en 2001:** 1956.45.

Voluntula Fondaĵo: **Nederlando:** R. Moerbeek 10.00. **Sumo en 2001:** 967.25.

Ĝenerala Kaso: **Japanio:** Anonime 32.00. **Usono:** Lee Miller 22.69. **Sumo en 2001:** 987.13.

DONACIOJ 2001 (EUR)

Ĝis la 31-a de decembro

Asocia Kapitalo: **Nederlando:** Heredaĵo J. Nikolov-Hoitsma 8857.41. **Sumo tutjara:** 45974.62.

Afrika Kapitalo: **Nederlando:** F.D. van Zoest 11.35. **Sumo tutjara:** 10106.20.

Fondaĵo Afriko: **Britio:** W.G. Phillips 32.00. **Hispanio:** M.R. Uruña 100.00. **Nederlando:** A. Beuzenberg 45.38; Esp. Ned. Sekcio M. Zeeland 45.38; F.H. Kat 45.38. **Svedio:** J. Hammarberg 62.82. **Sumo tutjara:** 5549.40.

Fondaĵo Ameriko: **Brazilo:** S.S. Ledon 50.00. **Britio:** G. Blakey 40.00. **Finnlando:** T. Sormunen 50.00. **Nederlando:** Fam. Bossong 12.85. **Svedio:** J. Hammarberg 20.94. **Sumo tutjara:** 4800.12.

Fondaĵo Azio: **Danio:** H. Thrane 50.00. **Finnlando:** A. Karkkainen (LdP = Lingvo de Paco) 100.00. **Germanio:** K. Bartling (LdP) 60.00; J. & P. Gersonde (LdP) 50.00. **Hispanio:** M.R. Uruña (LdP) 100.00; L. Hernández (LdP) 100.00. **Japanio:** Esperanto-Rondo de Ehime 17.29; H. Hukumoto 34.59; M. Itabasi 21.29; H. Matubara 17.29; H. Matuda 34.59; S. Miyamoto 17.29; N. Nisimura 17.29; K. Syozi (LdP) 200.00;

K. Tokunaga 17.29; M. Toyoda 25.94; K. Tutiya 17.29. **Svedio:** L. Holmlund (LdP) 41.88. **Sumo tutjara:** 3091.53.

Fondaĵo Kanuto: **Brazilo:** F.R. Borges 4.67. **Britio:** G.B. Dorow 9.60; L. Mee 50.00. **Finnlando:** H.R. Kesälä 10.00. **Nederlando:** A. Beuzenberg 40.75; F.H. Kat 45.38; D. van Zanten 28.00. **Svedio:** A. Emanuelsson 10.00. **Sumo tutjara:** 2364.92.

Konto Esperanto: **Hispanio:** L. Hernández 75.00; M.R. Uruña 100.00. **Japanio:** Kobe-Esperanto-Societo 1096.50. **Nederlando:** J.H. Derks 68.07. **Sumo tutjara:** 1966.50.

Junulara Fondaĵo: **Svedio:** A. Wingqvist (Pasp. Servo) 16.00. **Sumo tutjara:** 77.15.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: **Brazilo:** F.R. Borges 4.67; A.P. Ferreira 4.67; J.R. Piton 9.35. **Finnlando:** H.R. Kesälä 10.00. **Germanio:** F.J. Braun 20.00. **Nederlando:** C.M.v.d. Hoek 10.00; C.O. Hoenjens 10.00. **Sumo tutjara:** 2025.14. **Voluntula Fondaĵo:** **Brazilo:** C.M. Lemos 46.71; R.M.M. Lemos 46.71; L.E.M. Franco 4.67; O.C. Franco 4.67; Kolombio: L. Mejia 15.00. **Finnlando:** H.R. Kesälä 10.00. **Nederlando:** A. Beuzenberg 45.38; C. Bossong 4.86; G. Peet 25.00. **Sumo tutjara:** 170.25.

Ĝenerala Kaso: **Francio:** J. Gibaux 1100.00. **Svedio:** G. Olsson 34.03. **Usono:** S.M. Klimowicz 102.29. **Sumo tutjara:** 2223.45.

DONACIOJ 2002 (EUR)

Ĝis la 31-a de januaro

Fondaĵo Afriko: Anonime 37.00. **Sumo ĉi-jara:** 37.00.

Fondaĵo Ameriko: **Belgio:** La Verda Stelo (Kuba-kongreso) 254.06. **Francio:** M. Bivant (Kuba-kongreso) 50.00. **Germanio:** D. Blanke (Kuba-kongreso) 100.00. **Nederlando:** Fam. H. ten Hagen 50.00. **Usono:** W. Harmon 22.12. **Venezuelo:** J. Bachrick (juna latinamerikano al UK) 100.00. Kolekto Zamenhoffo 23.55. **Sumo ĉi-jara:** 599.73.

Fondaĵo Azio: **Belgio:** A. Decuynck-Bellaert (LdP) 10.00. **Italio:** E. Doerfler (LdP) 16.83. **Japanio:** S. Aikawa 34.38; M. Hirota 17.18; A. Nisinaga 17.18; E. Kimura 34.36; Z. Sibayama 17.18; S. Sugiyama 17.18; H. Takahasi 34.36; M. Tamura 17.62; T. Uehara 56.36; Y. Ueno 17.19; T. Yamada 17.19; H. Yamaguti 17.19; S. Yamamoto 34.38; Mine Yoshitaka (LdP) 100.00. **Venezuelo:** Kolekto Caracas (LdP) 32.53. **Sumo ĉi-jara:** 491.11.

Fondaĵo Kanuto: **Aŭstralio:** J.R. Bishop 10.00. **Finnlando:** A.-L. Ali-Simola 5.00. **Francio:** R. Gonin 50.00. **Luksemburgio:** B. Moon 50.00. **Nederlando:** W. Annes 10.00. **Sumo ĉi-jara:** 125.00.

Konto Esperanto: **Germanio:** D. Blanke 100.00. **Israelo:** K. Sicherman 50.00. **Sumo ĉi-jara:** 150.00.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: **Aŭstralio:** A. J. Bishop 10.00; J.R. Bishop 10.00. **Luksemburgio:** B. Moon 50.00. **Sumo ĉi-jara:** 70.00.

Voluntula Fondaĵo: **Aŭstralio:** A.J. Bishop 10.00; J.R. Bishop 10.00. **Sumo ĉi-jara:** 20.00.

Ĝenerala Kaso: **Germanio:** W. Ehler 5.00; J. Radam 1.13. **Nederlando:** J.M. Niemans 25.00. **Usono:** E. Snow 16.58. **Sumo ĉi-jara:** 47.71. **Al ĉiuj tre koran dankon! UEA**

Fortalezo konkeris parton de mia koro

Eŭropanoj ofte estas ofenditaj kiam ekstereŭropanoj kredas ke Kopenhago estas en Nederlando aŭ ne distingas inter Slovakio kaj Slovenio. Tamen ni apenaŭ konscias kiom minora estas nia propra kono de fora geografio. Ĝis antaŭ kvin jaroj mi eĉ ne aŭdis ke ekzistas brazila ŝtato Cearao.

Gian ĉefurbon, Fortaleza, mi fakte ne rimarkis sur la mapo, je kelkaj gradoj sub la ekvatora linio. Tamen dum lastaj kelkaj jaroj tiuj du terminoj – Cearao kaj Fortaleza – ĉiutage aperas en mia vivo kaj en mia vortaro. Ne pasas tago sen pluraj retmesaĝoj de tie, kaj ne pasas eĉ horo sen pensi pri tiu mondo-parto. Ne nur pro mia laboro kiu ligas min kun Fortaleza kaj Cearao ĉiutage, kiel kongres-organizanto, sed ankaŭ ĉar ili konkeris apartan lokon en mia koro. Mi tute ne dubas ke tio okazos al ĉiuj kiuj vizitos Cearaon kaj Fortalezon okaze de la 87-a UK.

Mi kredas ke apenaŭ povas ekzisti loko pli simila al paradizo sur la tero ol tiu. Ideala klimato, ĉiam suno, sed neniam tro varme. Belegaj plaĝoj priondumataj de la maro, kiu neniam tro ŝtormas, ondumetas ja sed ne ekstreme. La akvo estas de ideala varmeĉo kaj abundas je ĉiaj marestaĵoj, kiujn oni baldaŭ trovas sur la tabloj de cearaanoj en formo de nerezisteble bongustaj manĝoj. Palmoj, ekzotikaj fruktoj ĉie ĉirkaŭ vi. Eĉ pluraj dolĉakvaj laĝetoj kaj lagunoj ekzistas.

En la interno sterniĝas la monto Guaramiranga kun pluraj urbetoj kaj vilaĝoj, kaj ripozdomoj de fortelezanoj: unu el la plej ravaj lokoj kiujn mi iam ajn vidis. Ĝi prezentas majstroverkon de kunagado inter la tropika arbarejo, abunda sunlumo kaj akvoj kiuj fluas tra la rojoj, riveretoj kiuj spektakle ŝprucas el kataraktoj. Foje veninte tien oni ne volas reveni al la t.n. "civilizacio". Se mi vere "lasis mian koron" ie en tiu regiono tio estis en Guaramiranga.

Eble mi enamiĝis al Guaramiranga nur ĉar ĝi estas ion aparta en la pejzaĝo de Cearao. La plej famaj aferoj tie tamen estas la plaĝoj: antaŭ ol mi vizitis Guaramirangan mi havis grandan problemon elekti kion mi pleje ŝatas. Ĉu estis tio la dunoj de Kumbuko kun la apuda belega Banana Lago ĉirkaŭita de arbaroj, ĉu la absolute ekstertera pejzaĝo de Jericocoara – ŝajne nenie en la mondo oni povas tiel profunde senti la malstreĉan ripozflaron en la aero, kiel tie. Mi ankaŭ ne povas forgesi Morro Branco kun ĝia unika naturfenomeno – sabloj en diversaj koloroj, kaj la apudan Praia das Fontes kun multnombregaj akvofontoj kiuj verŝiĝas al la maro. Kaj ja, Lagoinha: plaĝo kies fotoj, pro la aparta beleco de tiu loko, fakte servas kiel "la" imagoj de Cearao. Proksime al la urbo troviĝas Plaĝo de Futuro, kie oni povas pasigi tute neforgeseblajn momentojn.

Nu, plaĝoj, plaĝoj... ĉu tio ne *tedas foje*? – Mi ja aŭdis tiun demandon, sed tion povas diri nur homoj kiuj ne konas Brazilon. Ili ne povas kompreni kial ekz. oni ofte mencias plaĝojn kiel Kopakabano aŭ Ipanemo... en Rio, aŭ Itacemo en Fortaleza, ĉar la eksteruloj ne komprenas kiel gravan rolon plaĝoj ludas

en la socia vivo de brazilanoj. Ĉio, ja preskaŭ ĉio grava okazas tie. Kaj kiam cearaanoj ne ĝuas siajn plaĝojn ili ja promenas matene aŭ vespere sur Beira Mar, tiu nepriskribebila apudmara ĉefvejno de Fortaleza. Aparte vespere oni ne rajtas foresti de tie.

Kaj fine, la urbo Fortaleza mem. Oni ja devas almenaŭ foje en la vivo viziti ĝin. Ĝi donas alian bildon pri Brazilo ol estas kutime en mia lando. Oni tuj pensas pri Rio-de-Janeiro, San-Paŭlo aŭ Brazilo... sed apenaŭ iu pensas pri preskaŭ anonima landeto Cearao. Nu, landeto! Ĝi ja estas granda kiel kvar Belgio aŭ Nederlando, kiel tri Danlando, aŭ proksimume kiel Irlando. Landeto ĝi ne estas! Kun siaj pli ol 7 milionoj da loĝantoj ankaŭ en Eŭropo ĝi estus serioza geografia nocio. Interne ion seka, la lando estas akvumata per ŝvito de siaj diligentaj kamparanoj, sed en la marbordo floras la turismo. Hoteloj kreskas tie pli rapide ol la palmoj, investoj pluvas, kaj ĉie oni konstruas, konstruas. Regas optimismo kaj la homoj ŝajne vidas bonajn perspektivojn. La turismo bone kongruas kun ĉefe agrikultura interno, kiu provizas nutraĵon por la kreskanta marborda turismo.

Ĉio tio, apud la tradicia afableco de brazilanoj, kreis la karakteron de cearanoj, konataj kiel malstreĉaj kaj elkoraj simpatiaĵoj kiuj tuj konkeras la korojn de siaj gastoj. Ili fakte estas la plej granda kapitalo de tiu belega urbo kaj la plej granda garantio ke la turismo tie havas brilan futuron. La nivelo kaj kvalito de servoj tie apenaŭ estas renkontebla aliloke. Rapida, digna, neta, kaj la fakturoj kaj la ŝanĝmono ĉiam precizas. Neniam mi spertis ian ajn malkorektaĵon pri tio, sed ja krome, ekstran esceptan afablecon ja ĉie. Gastojn oni traktas tie preskaŭ intime.

Fortalezo kreskas ĉiutage ankaŭ kiel internacia kongresurbo, kaj nia kongreso estas nun unu el la multaj kiuj nun celas tien. Tamen la esperantistoj ricevis escepte fortan subtenon de la lokaj aŭtoritatoj. Tion oni povas danki unuavice al la multjara kaj altkvalita laborego de niaj samideanoj. Ĉie, ĉie tra la urbo oni aŭdas pri E-o, oni komentas pri ĝi kaj ĝi estas ordinare traktata kiel bonega afero. Jen alia kialo veni

kaj nia kongreso estas nun unu el la multaj kiuj nun celas tien. Tamen la esperantistoj ricevis escepte fortan subtenon de la lokaj aŭtoritatoj. Tion oni povas danki unuavice al la multjara kaj altkvalita laborego de niaj samideanoj. Ĉie, ĉie tra la urbo oni aŭdas pri E-o, oni komentas pri ĝi kaj ĝi estas ordinare traktata kiel bonega afero. Jen alia kialo veni



al Fortaleza: por senti sin tie tute hejme kiel esperantisto kaj por renkonti tiujn senlacajn semantojn. Ni ĉiuj povus lerni de ili.

Jen nur kelkaj el multaj nombrebaj kialoj viziti Fortalezon. Baldaŭ en la kongresa numero de la revuo vi povos legi multe pli. Ni ja ofte aŭdas plendojn ke la movado estas tro eŭropeca, sed kiam venas la okazo amase maleŭropumi oni aliĝas modeste. Venu amase al la 87-a UK por subteni Esperanton kaj subteni niajn samideanojn en tiu granda kaj admirinda lando. Se vi venos vi estos ekstre premiita diversmaniere.

Nikola Rašić

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogol>.

18 jaroj en malliberejoj (1947). Tokuda Kyūiti (1894-1953). El la japana trad. (1948) Miyamoto Masao (1913-89). Oosaka: Riveroj, 1996. 112p. ISBN 4 947691 06 9. 18cm. Spertoj de japana komunisto. € 8,40.

Esperanto kalbos vadovélis. Lernolibro de Esperanto. Antanas Mekys (1917). Vilnius: Alma Littera, 2001. 182p. ISBN 9955 08 017 5. 22cm. Bind. Ilus. Por litovlingvanoj. Kun apendica anekdotaro kaj dudirekta vortareto. € 7,50.

Jarkolekto Esperanto 2001. Rotterdam: UEA, 2001. 220p. 27cm. Bind. 11 numeroj. € 25,50. Triona rabato ekde tri ekz.

Lernolibro de Esperanto. Esperanto kalbos vadovélis. Gediminas Degėsys (1980). Kaunas: Austra, 2001. 118p. ISBN 9986 941 79 2. 20cm. Por litovlingvanoj. € 6,00.

Litovaj-Esperantaj konversacioj. Lietuviški-Esperantiški pasikalbėjimai. Stasys Gaidamavičius (1947). Kaunas: Varpas, 1994. 174p. ISBN 9986 10 022 4. 19cm. Ĉefe por turisma uzo. € 8,40.

Nakahara Syūzi kaj lia

Tempo. Precipe pri la gazeto *Tempo*. Nozima Yastarō. Oosaka: Riveroj, 2000. 270p. ISBN 4 947691 13 1. 21cm. Japanlingva. € 18,00.

Ne grimacu! Ueyama Masao (1913-88). Oosaka: Riveroj, represo 1998. 145p. ISBN 4 947691 12 3. 18cm. Dek rakontoj (1963-82) de japana aŭtoro *Satinda kaj precipe aminda* (T. Hugiimoto). € 8,40.

Pensoj de l' animo, La. Pensieri dell' anima. Gabija Bulanavičiūtė-Vilėniškienė (1946). Trad en la italan Antonino Izzo. Kaunas: Naujasid Lankas, 2001. 47p. ISBN 9955 03 075 5. 20cm. Dulingva: E-itala. 22 sentoplenaj poemoj. € 3,60.

Planned Languages: From Concept to Reality. De Smet, Schubert, Tonkin, Blanke, Duc Gonnaz, Koutny, Liu Haitao, Corsetti, La Torre, van Oosten-dorp. Red. Klaus Schubert. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001. 257p. ISBN 806813 1 8. 24cm. Diverslingva: angla, Esperanto, franca, germana, nederlanda.

Ok studoj pri la demando kiel planlingvo evoluas al efektiva lingvo. Libra eldono de la n-ro 2000/3-4 de *Interface, Journal of Applied Linguistics*. € 24,00.



Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Poemaro de Li Bai (1). Li Bai (701-762). Kompilis kaj postparolis Shi Chengtai. Trad. W. Auld, Guozhu, K. Kalocsay, Laŭlum, Kenji Oosaka, Shi Chengtai, S. J. Zee. Oosaka: Riveroj, 1997. 141+5p. ISBN 4 947691 09 3. 22cm. Bind. La kremo de klasika ĉina poeto, en

esperantigo de elstaraj tradukistoj. € 19,80.

Pri Esperantaj libroj. Yamaguti Mitio (1937). Oosaka: Riveroj, 1999. 138p. ISBN 4 947691 14 X. 18cm. Japanlingva. Recenzoj pri originalaj kaj tradukitaj verkoj. € 9,90.

Sen komplikoj sen koliko Esperanta gramatiko. Romano Grinšpan. Panevėžys: Panevėžio spaustuvė, 2001. 40p. ISBN 9955 412 40 2. 21cm. Spritaj versajoj por transdonoj gramatikajn sciojn. € 2,70.

Studo pri la proleta Esperanta

Vivo kaj verkoj de Miyamoto Masao. Komp. Mine Yositaka. Oosaka: Riveroj, 1999. 91p. ISBN 4 947691 15 8. 18cm. Tekstoj de W. Auld, V. Benczik, U. Lins, M. de Seabra k.a. € 7,80.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Amata lando. Oraj kantoj 2. Red. M. Bronštejn, G. Kokolija. Kantas: Kočetkova, Sokolova, Sejnina, Usanova, Arosev, Bronštejn, Osokin, Dadaev, Malenko, Obrezkov, Povorin. Moskvo: Rusia E-ista Unio, 2001. 47 min. 19 plej popularaj kantoj de sovietiaj kaj rusiaj esperantistoj. € 13,50.

In-spir'. Morice Benin en Esperanto. Morice Benin. El la franca trad. G. Lagrange, R. Haveman, B. Legeay

movado en Japanio. Miyake Eizi (1957). Oosaka: Riveroj, 1995. 106p. ISBN 4 947691 03 4. 21cm. Japanlingva. € 7,80.

Tarptautinē Esperanto kalba. Vadovėlis mokyklai, kursams ir savimokai. Adomas Vaitilavičius (1915-97). Vilnius: 1994. 137p. ISBN 9986 10 027 5. 21cm. Lernolibro por litovlingvanoj. € 6,00.



De blazonoj ĝis verboj, de militmemoroj ĝis bildstrioj, de Japanio ĝis Katalunio...

Trisemajna restado en Polando. Tahira Masako (1941). Oosaka: Riveroj, 1999. 109p. ISBN 4 947691 16 6. 18cm. Japanlingva. Kun fotoj. Vojaĝo por instrui pri sorobano (kalkulado) kaj origamo (paperfaldado). € 9,90.

Unuan fojon, La. Kompilado de verkaĵoj de togolandaj esperantistoj pri unuafoja sperto. 23 diversaj aŭtoroj. Komp. Delfeno Tietti. Lomē: Fondaĵo Afriko de UEA, 2001. 40p. 21cm. € 4,20. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Vivo kaj verkoj de Miyamoto Masao. Komp. Mine Yositaka. Oosaka: Riveroj, 1999. 91p. ISBN 4 947691 15 8. 18cm. Tekstoj de W. Auld, V. Benczik, U. Lins, M. de Seabra k.a. € 7,80.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Amata lando. Oraj kantoj 2. Red. M. Bronštejn, G. Kokolija. Kantas: Kočetkova, Sokolova, Sejnina, Usanova, Arosev, Bronštejn, Osokin, Dadaev, Malenko, Obrezkov, Povorin. Moskvo: Rusia E-ista Unio, 2001. 47 min. 19 plej popularaj kantoj de sovietiaj kaj rusiaj esperantistoj. € 13,50.

In-spir'. Morice Benin en Esperanto. Morice Benin. El la franca trad. G. Lagrange, R. Haveman, B. Legeay

movado en Japanio. Miyake Eizi (1957). Oosaka: Riveroj, 1995. 106p. ISBN 4 947691 03 4. 21cm. Japanlingva. € 7,80.

Tarptautinē Esperanto kalba. Vadovėlis mokyklai, kursams ir savimokai. Adomas Vaitilavičius (1915-97). Vilnius: 1994. 137p. ISBN 9986 10 027 5. 21cm. Lernolibro por litovlingvanoj. € 6,00.

(István Ertl)



de Stano Marček

Lingvaj Etudoj

Plena Ilustrita Vort(lud)aro

Ne estas **sekreto**, ke fiŝojn oni ne kaptas per **seka reto**.

Li tute ne rimarkis, ke la **sendata** letero estas **sen-data**.

Am'ara ofte iĝas **amo** nia, se inter la du aperas iu **tria**...

Kat'aro de mia avino mal-saniĝis – je nazkat'aro.

Iom-post-iom, **po-ete**, li fariĝis **poeto**.

Ofte per la unua **sono** prezen-tas sin la **persono**.



Kirurgo operaciis **star-oston** de la **starosto**.

La **astro** ricevis la **nomon** laŭ la **astronomo**, kiu ĝin malkovris.

Plej bonajn **inspirojn** li ricevadis – aŭskultante **in-spirojn**.

Sur la **digo** estis aŭdebla **surdiga** bruego de la akvo.

Ŝi riĉiĝis pro **putoro**: en la **puto** ŝi trovis **oron**.

Estas **fino** de bona **moro**, se oni komencas uzi – **morfinon**.



La **kostoj** de la virinaj vestoj malkaŝas etimologion de la vorto **kostumo**.

Sia **amo** estis **for**: pro kolero ŝi ĵetis planken – **amforon**.

Li suferis pro malbona **stato** – de la **prostato**.

Ne **moku** indianon, se li estas **sen mokusenoj**.

Pro sankta **meso** li forgesis pri sia **promeso**.

Li divenis, ke la **dio** jam venis.



Per sia naiva **fido** li provokis – al **perfid**.

Ankoraŭ dum sia **et-aĝo** li falis el la tria **etaĝo**.

La vivo tute ne estas facila: daŭre oni devas obei iajn **regulojn** aŭ – **reg'ulojn**.

Astroj lin tiel **logis**, ke li fariĝis **astrologo**.

Li havis diverskolorajn vestojn kaj sur la **tuto** – **surtuton**.



UEA	LA UNDA KASITA PRO-VERBO	SIMBOLA DE AMPERO	PLENA PORTARO	UEA	PARAS KONIA	MAL-JUNA-AGNOL	LA DUA KASITA PRO-VERBO
SUPRA KORDA POKET				SALA MULTA			
ADVERBA PINARO		PRESA BAKBAGA NIGRO					
WANDALA SIMBOLA DE NOMB VINCIO			METALA DEKSTRA PURA DE FINEKTIVA				
REZIMO-JUCA LIGV			PREPO-ZIGIO TANTALA BASINO				
TU-MANIERE					NOMO DE LA DIA LITERO REANCINTA		
EKZISTAS						AGUSTINO PINARO PRIMO PRO-BAKCHENO	
ROMANE KOD		VIRVA ROMO REZIKUSI (redigita)					
POST-BERNO			LA FORTIKA PRUKY BORTA BORT				
VERIGO DE PASIVA PREZENCIA PARTICIPA				ROZ-INSULI KOVIVAS DE ORO			
LIGILO DE KUN IGITA BINGIO					SIMB DE PRIMO MAL-JUNA		
MAL-ROKIGITA						INFINITO DE PINARA SUTITA ESTREITO	
SIMBOLA DE KULTURO		MAL-ESTULAN TROTA VIRA LUP					
MUM-BALO			NATIRA KLORENO FOSDATA DE TRO				
METALA KUN-IGIL				ROZ-JUNIKO ROBERTA KUMABALA			
ELERT TON					TI KAJ MI MONTO SUN POKTITO		
CITILE MALPEZA						AGUSTINO PINARO LA GABOZ TROBULO	
SIMBOLA DE MEMORO		GRUP DA LITERO TANTA DE ROMO					
SIMBOLA DE DANTALO			VICE-POB KONTRAKA TANTO-KUNVENO				
GRANDA LIGNECA PLANT				VALORA METALO TILIANA ELULADO			
LOGO POR BRUTO					SUPERO PRABOZO RENKATA MALPEMO		
KAPOTE MONIGAS MAL-SUPREN						STURBATO DE SVEGRO KUBANA DANTO	
SUB-ESTIMATA PINARO		TATICA DONACU APARLA LIGURANT					
PRINU KON RECEPION			INTERIO PROTEST VIRA VEDIO				
GERMANA E-JUNO LABO				KUNBONO KUNJUNA KUNJARA KUNJO			
TUTU MAL-CHANCIO					INORGATO PRO-PRIMO SUPROSO TUMBONO		
GRU MAMO APUD PLIRO						LA SIDA TONO TOSKANE LINGU	
LIRIKA POEMO				PIEFROZ (MAL-GUSTA PARO)			

Aŭtoro: Stano Marček

HELPO: NADL, KEN, KILT, STER.